



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報週

7
1972



Kompartiano Umanerģiang de uĵura nacio (la meza), Uĵubajar de mongola nacio (la maldekstra) kaj membrino de la Junulara Ligo de korea nacio Kim Bing Ĝu studas en la Centra Nacia Instituto.

Laborista Inĝeniero Li

Ĉuangiang

KOMPARTIANO inĝeniero Li Ĉuangiang, kiu devenis de laboristo, estas labormodelo de la olea industrio de nia lando de multaj jaroj. En la pasintaj pli ol 20 jaroj li plurfoje vidis la grandan gvidanton de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong, ĉiam estas reprezentanto de la Tutlanda Popola Kongreso, trifoje ĉeestis la Tutlandan Labor-modelan Kunvenon kaj ĝuas profundan respekton kaj amon de la popolamasoj.


LA HISTORIO DE LI ĈUANGIANG

Li Ĉuangiang naskiĝis en familio de malriĉa kamparano de Ŝandong-provinco. Kiam li estis ok-jara, okazis superakvo en lia hejmloko. Pro la katastrofo, lia patro kun siaj familianoj fuĝis al Liŝu-gubernio de Gilin-provinco. Tamen en la malnova socio, malriĉuloj suferis ĉie, kie ili estis. Por sin vivteni, Li Ĉuangiang paŝtis en sia knabeco porkojn por bienulo, poste laboris kiel metilernanto kaj kulio en urbo, sate suferante ofendon kaj malhonoron. Fine li migris al Siping kaj laboris tie kiel metilernanto en iu olea metiejo. Krom fari laborojn de plenkreskulo, la mastro devigis lin ĉiu-vespere vektoporti 60 sitelojn da akvo por trempadi sojfabojn kaj turnadi milojn da kilogramoj da sojfaboj varmigataj sur hejtata terlito.

Iun profundan nokton, vidante ke la mastro kaj laborĉefoj jam endormiĝis, la tre laciĝinta Li Ĉuangiang priverŝis la sojfabojn per malpli da akvo kaj iris dormi. En la sekvinta tago li rimarkis kun

miro, ke la sojfaboj donis eĉ pli da oleo. Tio estis hazarda eltrovo. Por koni la sekreton, foje li tute ne priverŝis la sojfabojn kaj rezulte de tio eĉ pli multiĝis la produktokvanto de oleo. Tamen plena de malamo al la kapitalisto li preferis sin lacigi per akvoportado ol diri la sekreton al la mastro.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la laboristoj fariĝis mastroj de la lando. Sub la gvido de la Partio, Li Ĉuangiang laboris kiel estro de la produktita grupo, preninte sur sin la ŝarĝon de restarigo de produkto. Tiam preskaŭ bankrotis kelkaj oleaj metiejoj pro la reakcia regado de Kuomintango kaj restis nur tre malmultaj homfortaj olepremiĵoj, tial estis tre malfacile restarigi produktadon. Tiam en nia lando iris la Kampanjo Kontraŭbatali Usonon kaj Helpi Koreion. Sur industria fronto, disvolviĝis aktivado de kreo de novaj produktaj rekordoj. Li Ĉuangiang aktive respondis al la alvoko de la Partio. Li diris al laboristoj: “Kiel ajn multas malfaciloj, solveblas ili por la laboristoj. Ni estas mastroj de la lando, do ni devas pli multe kontribui al la ŝtato per niaj praktikaj agadoj.” Kune kun la laboristoj li rapide riparitis olepremiĵojn, tiel ke la produkto baldaŭ restariĝis, kaj krome li eldiris sian pasintan “eltrovon”. Lige kun la praktiko ili klopodis plibonigi sian teknikon en produktado, tiel ke la produktiveco de oleo senĉese leviĝis. En tiama produkta kondiĉo, ili levis la oledonan kvanton de 50 kilogramoj da sojfaboj de 4 ĝis 6.4 kilogramoj. Kamarado Li Ĉuangiang glorie membriĝis al la Komunista Partio de Ĉinio,



elektiĝis kiel reprezentanto por partopreni la Feston de la Unua de Majo en Pekino kaj feliĉe vidis Prezidanton Maŭ. Tio multe kuraĝigis la laboristojn de la tuta fabriko.

De tiam la laboristoj aktive agadis kaj ĉiamaniere klopodis por kontribui al pliprodukto de oleo. Foje en la laborejon blovis malvarma vento tra fenestroj de la tegmento, tio ekmemorigis al li la pasintan eltrovon: netrempitaj sojfaboj en alta temperaturo donis pli da oleo kaj la trempitaj sojfaboj en malalta temperaturo donis malpli da oleo. Li pensis, ke se oni konservas taŭgan temperaturon en la ĉambro, sojfaboj certe donos pli multe da oleo. Li do riparigis la tegmenton kune kun laboristoj kaj instaligis al la ĉambro dutavolajn vitrajn fenestrojn. Tiuj aranĝoj donis pli da oleo, el tio li eltrovis leĝon pri pliprodukto de oleo per konservo de temperaturo. Krome, li modeste lernis avangardajn metodojn de aliaj lokoj, senĉese riĉigis sian sperton, plibonigis olepreamajn ekipaĵojn kaj pligrandigis la oleoproduktan povon, tiel ke la produktokvanto de oleo rimarkinde grandiĝis kaj la laborintenseco reduktiĝis.

Koncerna scienca fakoprovigo pravigis la metodojn de kamarado Li Ĉuangiang per scienca teorio kaj nomis ĝin "metodo de Li Ĉuangiang pri sojolea produktado". Per tiu metodo oni pliiĝis la oledonan

kvanton de 50 kilogramoj da sojfaboj je preskaŭ unu kilogramo, kaj tiel kreis la plej altan rekordon de homforta olepreamado de la tuta lando.

DAŬRE ANTAŬENMARŜI

Kiam la labormetodo de Li Ĉuangiang estis disvastigata en la tuta lando, laboristoj de diversaj lokoj amase venis por rigardi kaj lerni. Tamen Li Ĉuangiang opiniis, ke la produktokvanto de oleo estas ankoraŭ malalta kaj la peza manlaboro ne radikale ŝanĝita, tial oni devas daŭre klopodi.

Foje, kiam li lernis en iu loko, li ekkonis fremdlandan metodojn, laŭ kiu oni produktas ĉefe per kemia procedo. Tamen ĝia produkta ekipaĵo estas komplika, ĝia procedo longa kaj la speco de produktaĵo ununura. Sur la revena vojo li cerbumadis kaj decidis utiligi raciajn partojn de tiu metodo, kuraĝe renovigi ĝin kaj elfari mekanikan olepreaman ekipaĵon taŭgan por uzo en nia lando.

Reveninte en la fabrikon, li elmetis proponon anstataŭigi la malnovan olepreamilon per mekanika ekipaĵo, kiu ricevis aprobon de la partia organizo kaj subtenon de la laboristoj. Tamen iuj timis, ke okazos akcidentoj pro multeco de ekipaĵoj, komplikeco de tekniko kaj manko de sperta direktanto en produktado. Aliaj maltrankvile diris al Li Ĉuangiang: "Tio estas malfacila por ni simplaj meti-

istoj! Gardu vin ke vi ne perdu vian labormetodon kaj honoron pro tio." Sed Li Ĉuangiang diris: "Por revolucii oni devas antaŭenmarŝi, sed neniam lasi honoron bari nian vojon."

En la fabriko leviĝis movado de teknika renovigo. Li Ĉuangiang kaj laboristoj tage kaj nokte laboris sur la produkta fronto. Utiligante ekzistantajn kaj eluzitajn materialojn ili faris 8 grandajn vazojn kun alteco de du metroj kaj diametro de 1.9 metroj por ekstrakti sojfaban oleon. Krome ili mem produktis kaj instalis elektran rul-cilindron por varmigi sojfabojn surbaze de tiamaj kondiĉoj. La finkonstruita mekanika laborejo sukcese komen-

cis produktadon. La oledona kvanto de 50 kilogramoj da sojfaboj pliiĝis 2 kilogramojn, la kvalito atingis la unuagradan normon difinitan de la ŝtato kaj la bezonataj laborfortoj reduktiĝis je 70%. Ekde tiam homforta olepremado estas nuligita en la fabriko.

La laborejo de Li Ĉuangiang la unua efektivigis mekanikigon, kio ricevis laŭdon de la vastaj laboristaj amasoj de la olea industrio. En 1959 li estis refoje elektita kiel reprezentanto por ĉeesti la Tutlandan Labormodelan Kunvenon kaj lia laborejo estis honore nomata kiel "ruĝa flago de la olea industrio de la tuta lando".



Li Ĉuangiang faras teknikan renovigon kune kun laboristoj.

TROVO DE NOVA VOJO

En 1964 Li Ĉuangiang estis refoje elektita kiel reprezentanto de la Tria Tutlanda Popola Kongreso. En la kunveno Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj transdiris la instruon de Prezidanto Maŭ: **“En la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas; ili neniam restas sur la sama nivelo.”** Firme tenante la instruon de Prezidanto Maŭ en la koro, en la pasintaj jaroj Li Ĉuangiang senĉese faris novajn kontribuojn al disvolvo de la olea industrio de nia lando. En 1970 la grenata buroo de Gilin-provinco okazigis laboran kunvenon en Siping por eltrovi novajn olematerialojn kaj pliprodukti oleon, en kiu Li

Ĉuangiang refoje elmetis proponon pri ĝenerala mekanikigo de oleprodukto, kio ricevis varman respondon de la grenaj fakoj kaj reprezentantoj de diversaj lokoj de la provinco. Post finiĝo de la kunveno stariĝis “renoviga grupo de oleproduktaj ekipaĵoj de Gilin-provinco” kaj Li Ĉuangiang estis nomita kiel ĝia estro. De tiam li kaj liaj grupanoj profundiĝis en la vegetajoleajn fabrikojn de la tuta provinco por fari konkretajn direktaĵojn kaj helpon. Ĉie en la provinco disvolviĝis movado de teknika renovigo kaj mekanikigo de ekipaĵoj. La bonega situacio multe kuraĝigis lin. Kvankam li jam estas pli-ol-50-jara, tamen li vigleplene trairis regionojn de Ĉangbaj-montaro kaj Sunĝiaŭ-ebenejo.



Li Ĉuangiang (la meza) kaj analizistoj kune ekzamenas poreksportan fosfolipidon.

En la vintro de la pasinta jaro, Li Ĉuangiang venis kune kun sia teknika grupo al olefabriko en mont-regiono. En ĝi ili faris profundan kaj detalan enketon kaj trovis, ke la fabriksdomo altas nur 6.5 metrojn, tamen la projektata ekipaĵo altas dek metrojn kaj ne konformas al la ekzistantaj kondiĉoj. Ili do propagandis inter la laboristoj la principon konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie. Unuflanke ili rimarkigis la avantaĝojn de la projekto kaj aliflanke montris ĝiajn mankojn kiel malŝparon de laborfortoj, tempo kaj materialoj. Ili proponis kombini lokan metodon kun la moderna laŭ la kondiĉoj de malgranda fabriko de montregiono. La olefabriko akceptis ilian proponon. Li Ĉuangiang kune kun ili reviziis la projekton laŭ la ekzistantaj kondiĉoj kaj postulo de la teknika renovigo. En kvar monatoj, la ekipaĵoj estis instalitaj kaj baldaŭ komenciĝis produktado sen rekonstruo de la fabriksdomo. Li Ĉuangiang ĝuste tiel laboras tie, kie necesas teknika renovigo kaj troviĝas malfaciloj. Kiam iuj olefabrikoj urĝe bezonis ekipaĵojn, kun komunisma spirito de interhelpo li donis al ili rezervatajn ekipaĵojn de sia fabriko. Kaj li pleniĝis de ĝojo, vidinte ke la nove rekonstruitaj fabrikoj rapide komencis produktadon.

Sed la proletara avangarda batalanto ne haltis en tiuj sukcesoj. Kiam olefabrikoj de diversaj lokoj ankoraŭ sin trovis en rekonstruado, li jam pensis pri la problemo de materialo post efektivigo de mekanikigo de la plejparto de la olefabrikoj.

Pro disvolvo de produktiveco de la fabriko, kie laboras Li Ĉuangiang, la materialo, kiu antaŭe sufiĉis por unu jaro, nun sufiĉas nur por duonjaro. Por krei pli multe da riĉaĵo por la ŝtato ili ekstraktis el olea rekremento nutrozan produktaĵon de fosfolipido por eksportado de la ŝtato. El tio Li Ĉuangiang profunde komprenis, ke scienco estas senfina. En nia vasta lando ĉie troviĝas sovaĝaj oledonaj vegetaĵoj kaj oni povas fari sintezan utiligon de diversaj materialoj. Se nur ni trovos




Li Ĉuangiang provfabrikis senŝeligilon de sunfloraj semoj.

taŭgajn metodojn, ni povos turni senutilajn materialojn en trezoron kaj krei pli multe da riĉaĵo por la ŝtato.

Kune kun laboristoj Li Ĉuangiang faris sintezan utiligon de oleaj materialoj unue en sia fabriko. Ili ekstraktis grandan kvanton da oleo uzata en industrio el fruktoj de ksantio (*Xanthium sibiricum*), sovaĝa sezamo k.a. pli ol 10 sovaĝaj vegetaĵoj, el kerno de maizospikoj kaj riza brano, kiujn oni uzis antaŭe kiel furaĝon. El 50 kilogramoj da riza brano oni povas ekstrakti 7.5 kilogramojn da porindustria oleo, kaj el ĝia rekremento oni povas ekstrakti medikamentan materialon kaj fari vinon kaj porkan furaĝon. Ĉiujare ili ne nur povas superplenumi produktan taskon de sojfaba oleo, sed ankaŭ produkti pli ol 100 tunojn da sojfaba fosfolipido. Samtempe el diversaj eluzitaj materialoj ili produktas oleajn kemiaĵojn de 11 specoj, kiaj fosfolipido kaj heksanolo. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, kune kun laboristoj kaj teknikistoj li provfabrikis senŝeligilon de sunfloraj semoj post pli ol 100 eksperimentoj, kio kreis novan kondiĉon por sinteza utiligo de oledonaj materialoj.

Vej Giangge—Montohakanto kaj Vojmalfermanto



Vej Giangge

KOMUNISTO kaj malmobilizita armeano Vej Giangge loĝas en la vilaĝo Bejgiaŭ de Jiŝan-gubernio, la Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono. Kiam li servis en la armeo, li estis heroo de vojkonstruado sur Kangzang-altobenejo. Nun li fariĝis montohakanto en la konstruado de nova socialisma kamparo. Li neniam montras fieron pro siaj meritoj, ĉiam restas modesta antaŭ honoro kaj konservas la viglecon de komunisto.

Ĝis printempo de 1966, jam pasis 11 jaroj post kiam Vej Giangge revenis en la vilaĝon. Tiam la Ginan-a Trupo trifoje telegrafis al li por inviti lin ĉeesti kunvenon por nomi iun kompanion “Montohaka kaj Vojmalferma Avangarda Kompanio”. La telegramoj tuj vigligis la montvilaĝon. Lia hejmo estis frekventata de vizitantoj, kiuj ridis, interparolis kaj laŭdis. Komunumano Vej Giĉang demandis apenaŭ paŝinte en la domon: “Vi povas konfidi al mi viajn ŝlosilojn, kial pri viaj meritoj vi tenas sekreton al mi?” Rigardante la gajan vizaĝon, li respondis: “Kiel vojkonstruanto, mi faris nur malmultajn aferojn por la popolo, ĉu tio estas menciinda? Komunisto celas revoluciaĉdon, sed ne meriton.”

En la armeo Vej Giangge estis estro de la “Meritula Oka Subplotono” de iu trupo. Dum konstruado de Kangzang-ŝoseo, li grimpis dekelkajn montojn altajn je 4,000-5,000 metroj kaj travadis multajn torentajn riverojn. Sur la danĝera monto



Veĵ Giangge interparolas kun intelektaj ĝejnunuloj.

Erlang li hakis ŝtonojn por konstrui ŝoseon; sur Giapila-monto, kie temperaturo ofte estas 30-40 gradoj sub la nulo, li ŝvitis pro penema laboro; portante 35 kg. da objektoj li la unua surgrimpis la pinton de la senhoma monto Kjueer kovrata de glacio kaj neĝo kaj regata de maldensa aero; ligante sin je la talio per ŝnuro li pendis sur la krutega rokmuro en valo Ĵanvo por eksplodigi kaj forigi danĝerajn rokojn; li sola transnaĝis la frostan Bodoŭzangbu-riveron por prospektoradi...

En la kompanio, en kiu servis Veĵ Giangge, cirkulis la diro: "Kie estas plej granda mal-facilo, tie estas Veĵ Giangge."

Veĵ Giangge estis tia brava batalanto, kiu hakis monton kaj konstruis vojon por la revolucio. En la 5-jara konstruado de Kangzang-ŝoseo, li faris 9 meritojn kaj 1 eksterordinaran meriton, trifoje estis elektita kiel unuagrada heroo modelo, kvinfoje kiel avangarda komunisto kaj unufoje tutlanda voj-konstrua modelo. En aprilo de 1954, Veĵ Giangge venis al Pekino kaj kune kun aliaj herooj kaj

modeloj de diversaj frontoj vidis la grandan gvidanton de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ.

Veĵ Giangge revenis en sian hejmvilaĝon en julio de 1955, kiam arde leviĝis la tajdo de agrikultura kooperado. En la ŝtorma revolucia movado, li pensis, ke komunisto devas iniciate iri sur la socialisman vojon. Trovinte, ke la vilaĝo ne havis sufiĉajn bovojn por plugi, li aĉetis bubalon per sia propra mono donita de la trupo, por starigi kooperativon kune kun kamparanoj. Vidinte la bubalon aĉetitan de li por la kolektivo, la kamparanoj tre ĝojis kaj varme laŭdis. Lia amiko Veĵ Gi-an zorge diris al li: "La mono estas donita de la trupo por via propra uzo post reveno al la hejmo, nun vi foruzis la monon por aĉeti bubalon kaj kiel vi povos aranĝi vian hejmon estonte?" Veĵ Giangge diris kun rideto: "Kooperativo ja estas mia hejmo. Aĉeti bubalon por la kooperativo ja estas bona aranĝo por mia hejmo."

Ke Veĵ Giangge aĉetis bubalon por la kooperativo, tio rapide disvastiĝis tra la montregiono. En



Vej Giangge kaj aliaj sin preparas al konstruado de kanalo.

la vilaĝo Bejgiaŭ aperis la unua agrikultura kooperativo de la distrikto.

Progresis la agrikultura kooperativo kaj ankaŭ leviĝadis klasbatalo en la montvilaĝo. En 1957, plenmano da klasaj malamikoj agitis amasojn ekŝiĝi el la kooperativo. Vej Giangge pensis: Prezidanto Maŭ alvokis nin organiziĝi, sed ili agitis ekŝiĝon el la kooperativo, ĉu tio ne estas detruo de ponto al la socialisma vojo?" Li kuraĝe elpaŝis kaj propagandis al kooperativanoj la veron "Nur socialismo povas savi Ĉinion", tiel ke oni frakasis intrigon de klasaj malamikoj, firmigis la kooperativon kaj poste disvolvis ĝin en komunumon.

Vej Giangge okupiĝis pri zorgo de grenejo de la grupo dek jarojn. Li neniam prenis al si grajnjon da greno de kolektivo kaj neniam eraris eĉ je 1 cendo en la kontado. En rikolta sezono li dormis en grenejo kaj en varma kaj pluva vetero li senĉese aerumis grenon, tial la greno vendita de Bejgiaŭ

al la ŝtato estas ĉiam seka kaj pura. Foje, kiam li estis sunumanta 1,500 kg. da greno sur draŝejo, lia edzino alportis siajn 25 kg. da maizo por ke li samtempe prizorgu ĝin. En tagmezo subite aperis plumbaj nuboj, kiuj aŭguris pluvegon. Vej Giangge tuj amasigis la grenon kaj portis ĝin en la grenejon. Pro intensa laboro li ŝvitegis. Kiam li finis transportadon de la tuta greno de la grupo, ekpluvegis. Lia propra maizo estis malsekigita.

En iu fulmotondra nokto, komunumanoj Vej Giĉang kaj Vej Ŝiŝu samtempe ekmemoris, ke la nove masonitaj muroj de la grenejo de la grupo ne estis kovritaj. Ili tuj ellitiĝis kaj kuris al la grenejo portante kun si pajlon. Kiam ili atingis ĝin, en fulmo ili vidis homon sur la alta muro. Ili samtempe kriis: "Giangge!" Estis neatendite, ke Vej Giangge venis pli frue ol ili. Ankaŭ aliaj tri komunumanoj venis por helpi. Ĉiuj volis anstataŭi lin, sed li diris: "Ne suriru, ĉar supre la vento kaj pluvo estas forta, tuj donu al mi pajlon!" Fine restis la frontono, kiu ankoraŭ ne estis kovrita. Ĉiuj aliaj admonis lin: "Giangge, la frontono estas alta kaj danĝera, vi tuj malsupreniru!" Sed li laboris pli energie. Dank' al kuna klopodo ĉiuj muroj estis bone kovritaj.

En 1969, kiam malfrua rizo jam floris kaj spiĝiĝis, reŭmatismo denove turmentis Vej Giangge. Pro doloro li ne povis rektigi sian talion. En tiu tempo irigaciisto de la grupo malsaniĝis. Vej Giangge pensis, ke sen bona zorgo pri irigacio malfrua rizo ne donos bonan rikolton. Li do ellitiĝis kaj iris al kampo kun ŝpato sur ŝultro apogante sin sur bastono. Kiam li venis al la digo, li aŭdis ian sonon de fluado kaj trovis, ke likis la digo. Neniu troviĝis proksime. Kion fari? Li elakvigis grandan ŝtonon kaj pene ŝtopis per ĝi la truon. Kiam li surbordiĝis kaj vidis la bone kreskantajn plantidojn, li kvazaŭ forgesis la doloron.

Bejgiaŭ antaŭe estis malriĉa montvilaĝo kun altaj montoj kaj malmultaj kampoj kie ofte okazis sekeco. Tiam ĉirklulis la diro: "Ĉe Bejgiaŭ la akvo de valoj forfluas vane kaj la kampoj restas sekaj." Sed nun ĝi jam tute novigis sian fizionomion.

Sur la vasta socialisma vojo Vej Giangge kaj la komunumanoj marŝas pli kaj pli brave. Ili hakis montojn por krei kampojn kaj transformis malaltproduktajn kampojn en altproduktajn. Dank' al ilia klopodo la produktokvanto de greno kreskis jaron post jaro. En 1963 Bejgiaŭ trafis eksterordinaran sekecon. La arda suno krevigis

la kampojn kaj oni ne povis transplanti rizidojn. Vej Giangge gvidis la komunumanojn por batali kontraŭ sekeco. Post klopodo de pli ol 100 tagoj ili fine kondukis akvon en kampojn dek metrojn altajn kaj sukcesis transplanti rizidojn. En tiu jaro ili akiris riĉan rikolton kaj ekhavis superfluan grenon.

Bona rikolto en seka jaro pensigis Vej Giangge, ke por ŝanĝi la fizionomion de malriĉa montvilaĝo, oni unue devas entrepreni akvoutiligan konstruadon. Li do interkonsiliĝis kun komunumanoj pri plano de la konstruado. Kune kun kadroj li elmetis la projekton "konstrui kanalojn ĉirkaŭ Maŭvej-monto kaj starigi pumpstacion por konduki akvon sur montojn".

La propono de Vej Giangge pri akvoutiligo ricevis subtenon de vastaj amasoj de komunumanoj kaj baldaŭ ruĝaj flagoj ekflirtis super la akvoutiliga konstruejo de Maŭvej-monto. Sub lia gvido organiziĝis sturma taĉmento el pli ol 40 geviroj kaj gejunuloj. Li komencis hakadi monton per 12-funta martelo, kun la sama entuziasmo en la pasinteco. Foje, li subite svenis pro varmego kaj ĉiuj alkuris kaj savis lin el la danĝero. Tiam oni diris al li ameme: "Giangge, vi devas zorgi pri via sano!" Vej Giangge transprenis la tason da

akvo kaj diris trinkante: "Por konstrui novan montregionon, mi devas marteladi ĝis la fina venko."

Plene utiligante la neokupatan labortempon en tri vintroj kaj printempoj, Vej Giangge kaj la komunumanoj masonis irigacian kanalon kun longeco de 2 kilometroj, fondis pumpstacion kaj tiamaniere ŝanĝis dek hektarojn da sekaj kampoj en rizkampojn bone irigaciatajn. En 1969, la meznombra pomua produktokvanto de Bejgiaŭ superis 400 kilogramojn.

Vej Giangge kaj la popolanoj de Bejgiaŭ tamen ne kontentiĝis pri la akirita sukceso kaj ĝin rigardis nur kiel novan startpunkton en konstruado de la nova montregiono.

Nun Vej Giangge estas membro de la subprovinca, gubernia kaj komunuma komitatoj de la Komunista Partio de Ĉinio. Li tamen ĉiam modeste kaj viveplene persistas en la agrikultura produkto. Antaŭnelonge, portante litajon kaj instrumentojn surdorse, li iris al la nova konstruejo de Lidong-akvokonservejo.

Kun heroismo, avangardano de la proletaro Vej Giangge nun daŭre kontribuas al la socialisma konstruado.



Vej Giangge kaj komunumanoj kune selektas spikojn de bonaj semoj en la kampo.

Hu Gujhiu

MALVARMETA zefiro agrabligis la aŭtunan nokton de la montregiono. En la vespera lernejo de la kvara grupo de Longgang-brigado de Toŭpo-komunumo de Guangĉang-gubernio en la malnova revolucia bazloko de suda Gianghi, lampoj brilis kaj neniuj sidlokoj estis libera. Junulino sur la podio donis lecionon: “Praktika kaj realisma laborstilo estas la fundamenta laborstilo de proletara partio. Ni komunistoj devas tenadi kaj disvolvi la eminentan laborstilon de la Partio kaj esti modeloj en serĉado de vero el faktoj...”

La junulino donanta lecionon pri partiaj scioj al partianoj kaj aktivuloj nomiĝas Hu Gujhiu. Ŝi parolis pri la temo “Kompartiano devas esti modelo en serĉado de vero el faktoj”, kaj ŝi mem estas ĝuste tia kompartiano.

Ŝi estas filino de malriĉkampano kaj aliĝis al la Partio en 1965. Ekde la vintro de 1969, ŝi laboras kiel sekretario de la partia filio de la produkta grupo. Tiutempe, la pomua produktokvanto de greno de tiu grupo estis nur ĉ. 200 kilogramoj. En la tago, kiam Hu Gujhiu estis elektita kiel sekretario de la partia filio, la sekretario de la brigada ĝenerala parti-filio diris al ŝi: “Ni kompartianoj ĉiam devas persisti en la socialisma direkto kaj firmiĝi gvidi la partianojn kaj komunumanojn en klopodado por ŝanĝi la staton de malalta produkto.” Liaj vortoj multe inspiris ŝin.

Vespere, Hu Gujhiu kunvokis la partianojn, membrojn de la Komunisma Junulara Ligo, kadrojn kaj reprezentantojn de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj al kunsido por analizi la kaŭzon de malalta produkto de greno kaj eltrovi rimedojn por pliprodukto. Iu partiano diris: “Niaj kampoj donis nur unu rikolton en ĉiu jaro,

do la produktokvanto estis sendube malalta. La kadroj de la grupo ĉiujare parolis pri ŝanĝo de unu rikolto en du en unu jaro, tamen neniam tion efektivigis, kiel do oni povas altigi la produkton?” Reprezentanto de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj diris: “Se nur la kadroj donos bonan ekzemplon en tiu laboro, ni certe povos kulturi durikoltan rizon en la montvaloj!” Tion aŭdinte, Hu Gujhiu sentis, ke heliĝas la koro. Ŝi notis unu post alia iliajn opiniojn kaj transdonis ilin al la partia filio por diskutado. Plena kunveno de la partia filio decidis unuanime reformi montajn kampojn por kulturi rizon dufoje anstataŭ unufoje en unu jaro.

En rizkampoj kaj sur monto de la produkta grupo, vigle laboris komunumanoj; iuj sarkis herbojn por prepari sterkon, aliaj fosis kanaletojn por dreni akvon. Hu Gujhiu ĉiutage laboris kune kun ili. Post ilia klopodado en unu printempo, la kampoj en la valoj estis reformitaj kaj plantitaj per fruaj rizidoj.

En tiu jaro, la totala areo de la kampoj donantaj du rikoltojn de rizo atingis 80% de la agroj de tiu grupo kaj la pomua produktokvanto de greno altiĝis ĝis 416.5 kilogramoj.

Post pliprodukto en 1970, en la amasoj aperis du opinioj. En la printempo de 1971, kiam oni diskutis pri la plano pri pliproduktado de frua rizo, iuj junuloj diris: “En 1970 ni akiris riĉegan rikolton kaj la socialisma aktiveco de la amasoj estas tre alta, do ni devas altigi la produktokvanton de ĉijara frua rizo ĝis tiu de du rikoltoj en la pasinta jaro.” Aliaj opiniis, ke post la akiro de granda pliprodukto en la pasinta jaro, oni ne devas hasti en la kuranta jaro, kaj estos jam bone,



se la produktokvanto de la frua rizo povos resti ĉe la nivelo de la pasinta jaro. Ne povante atingi konsenton, la diskutantoj petis, ke Hu Gujhiu diru sian opinion. Hu Gujhiu petis, ke unue parolu maljuna komunumano onklo Li. Kaj tiu ĉi diris: “Estas maldiligente ne fosi foseblan puton, tamen estas neeble fosi puton per unu ŝovelo.” Tiam Hu Gujhiu diris al la aliaj: “Prave diris la onklo! Ni nepre faros, kion oni povas fari; kaj ni ne devas fari spite, kion oni ne povas fari. Ni devas starigi nian planon tiel, ke ĝi estas pozitiva kaj efektivebla.” Tiam iu junulo ankoraŭ ne volis cedi kaj diris insiste: “Se ni fiksos la celajn iom alta, tio stimulos la amasojn. Ĉu tio ne estas bona?” Hu Gujhiu diris: “Se la fiksita celo estus evidente neatinigebla, do la stimulo ne havas solidan bazon. En plenumado de laboroj, ni devas promesi kion ni povas efektiviĝi. Se ni povas plenumi kion ni promesis kun realisma laborstilo, tiam la amasoj laboros kun ĉiam pli granda entuziasmo.” Tion aŭdinte, ĉiuj komunumanoj ekridis. Iu maljuna kamparano diris: “Ni fidus al tiaj kadroj, kiuj opinias kaj agas konforme al vero.” Post ripetada diskuto, la kvara produktogrupo fine ellaboris

pozitivan kaj certe plenumeblan planon por pliprodukto de frua rizo.

Sub la gvido de Hu Gujhiu la plano estis efektivebla. Kiam la printempa plugado estis finiĝonta, post plurfoja kalkulo de la kampoj ŝi trovis, ke la totala areo de la kampoj de frua rizo atingis 259.9 muojn, t.e. 0.1 muo malpli multa ol la planita cifero. Tiam la komunuma administracio postulis, ke oni raportu pri la efektiveco de la plano. Iu kadro diris: “Ĉijare, ni bone observis la principon de racia densa plantado, kaj la pliplantitaj rizidoj certe superis tiujn por 0.1 muo da kampo. Do raportu, ke ni plantis 260 muojn.” Sed Hu Gujhiu malkonsentis dirante: “Racia densa plantado estas afero farenda por ni kaj la manko de 0.1-mua fru-riza kampo signifas, ke ni ne plenumis nian devon. Ni devas raporti laŭ la efektiveco. La supera instanco povas ĝuste gvidi la laborojn, nur se ĝi bonege informiĝas pri la statoj en la baza nivelo.”

Informiĝinte, ke la plano ne plenumiĝis pro manko de 0.1 muo da kampo de frua rizo, iuj komunumanoj proponis redukti la plantareon de ekonomiaj plantoj je 0.1 muo por ŝtopi tiun mankon. Hu Gujhiu diris: “Oni ne devas tiel fari. Koncerne al raporto al la supera instanco, oni ne devas fari eĉ la plej malgrandan mensogon; kaj koncerne al la plantareo de ekonomiaj plantoj difinita de la ŝtato laŭ plano nenia rabato devas esti farita. Ni devas elpensi rimedon por plenumi la kulturelan planon de frua rizo.” Aŭdinte ŝiajn vortojn, maljuna kamparano onklo Tang diris: “Gujhiu diris prave.” Li proponis iom vastigi la kampojn ĉe la anguloj kaj randoj por krei la bezonatan 0.1 muon da kampo. La estro de la milica taĉmento meminciate prenis por si tiun taskon. Hu Gujhiu ĝoje laboris kune kun la aliaj kaj rapide superplenumis la taskon de kreo de 0.1 muo da kampo.

Kiam kreskis la fru-rizaj plantoj, Hu Gujhiu gvidis la komunumanojn por flegado de la plantoj laŭ la malsamaj statoj de la kampoj kaj fine akiris

riĉan rikolton de frua rizo. La totala produkto-kvanto de frua rizo estas je 31% pli granda ol tiu de 1970 kaj la pliprodukta plano estis efektivigita.

Hu Gujhiu ofte diris: "La principo agi konforme al vero devas esti observata en traktado de homoj kaj aferoj, kaj eĉ pli strikte en traktado de si mem. Oni ne devas grandigi sian atingon, nek malgrandigi sian mankon, sed kulturi la bonan stilon de observado de la principo agi konforme al vero."

Foje, la gubernia instanco postulis ke la respondeculoj de la komunumoj vizitu la kvaran produktogrupon por lerni ĝian sperton. Iu kadro de la grupo tuj ordonis, ke komunumanoj transportu sterkon al la apudvojaj kampoj. "Oni venos pri-rigardi nian grupon," li diris, "do ni devas aranĝi tiel ke la kampoj apud la vojoj aspektu bele." Informiĝinte pri tio, Hu Gujhiu tuj kuris al li kaj malkonsilis: "Ni faras revolucion ja ne por bela formo, kiel brodita kapkuseno kies enhavo estas brano. Ni devas fari nian laboron ĉiam solide kaj honeste, ĉu oni venos rigardi aŭ ne."

Tiunokte, kuŝante en lito, Hu Gujhiu pensadis: Kial la kadro de la grupo elmetis tian proponon? Ŝi pensis, ke lastatempe ŝi ofte parolis pli multe pri la sukcesoj ol la difektoj. Ŝi pensis, ke la vantemo de iuj kadroj havas rektan rilaton kun ŝia fiera penso. Ŝi leviĝis, lumigis la lampon kaj komencis studi koncernan instruon de Prezidanto Maŭ: "Ni devas esti modestaj kaj singardemaj, sed ne fieraj kaj malpaciencaj, kaj servi al la ĉina popolo tutkore kaj tutanime..." "...ni devas agi honeste; sen honesta sinteno, estas absolute neeble sukcese plenumi iajn laborojn en la mondo." Hu Gujhiu sentis, ke tiuj vortoj donis al ŝi profundan edukon.

En la sekvanta tago, ŝi iris al la kadro kaj antaŭ ĉio faris memkritikon pri sia fiereco kaj memkontentiĝo. Ankaŭ tiu kadro faris memkritikon pri sia erara penso. Altiĝis la kono de ili ambaŭ. Kiam respondeculoj de la komunumoj de la tuta gubernio vizitis ilian grupon, Hu Gujhiu kondukis ilin rigardi ne nur la bonajn kampojn apud la vojoj, sed ankaŭ la relative malbonajn kampojn en la valoj. Dum prezentado de la grupo, ŝi parolis ankaŭ pri sia fieriĝo kaj memkontento kaj petis de ĉiuj vizitantoj kritikon. La respondeculoj de la komunumoj diris emocie: "Vi montris al ni la bonan stilon agi konforme al vero, modesteco kaj singardemo kaj instruis al ni la revolucion spiriton de ĝusta traktado al si mem laŭ la filozofio dividi unu en du. Ni devas lerni de vi."



1000-METRA MALPEZA PETROLA DRILO

La Ŝigiaĝuang-a Karbomina Maŝin-fabrika de Hebej-provinco kaj iuj uzantaj unuoj kune fabrikis 1000-metran petrolan drilon aparte por prospektori malprofundan petroltavolon. La drilo kun strikta strukturo estas malgranda kaj malpeza. Ĝia laborpovo estas 2-3-oble pli granda ol la antaŭaj samspecaj driloj. Ĝi povas redukti laborintensecon kaj garantii sekurecon de produktado.

METEOLGIAJ STACIOJ EN TIBETO

Kun evoluigo de la industria kaj agrikultura produktado, la veterprognoza laboro en la Tibeta Altebenejo disvolviĝas iom post iom sub la zorgo de la Partio kaj registaro. Nun en Ĉamdo, Ŝannan, Ŝkaze, Ali, Nagĉu, Lhasa, Linĉi kaj aliaj regionoj fondiĝis meteologiaj stacioj. En la tuta aŭtonoma regiono unuapaŝe formiĝis reto de meteologiaj stacioj. Krom la ordinaran surteran observadon, la stacioj ankoraŭ faras observadon de aero, suno kaj aliaj meteologiaj fenomenoj.

FONTOPENIKO

La Nankin-a Fontopluma Fabrika sukcesis fari fontopenikon.

La fontopeniko aspekte similas al fontoplumo, kunportas densan hartufon ĉe ekstremo de la penika stangeto kaj havas kaŭĉukan tubeton por enteni inkon. Ĝia skribaĵo estas flua. Ĝi estas longe uzebla, malkara, oportuna por porti en poŝo, kaj la hartufo estas ŝangebla. La peniko ne nur taŭgas por ordinara skribado, sed ankaŭ por skriba ekzercado de elementaj lernantoj.

Subtropikaj Plantaĵoj de Guangdong

Mateno en kaŭĉukbaro



Guangdong estas la plej suda provinco de Ĉinio kun areo de pli ol 200,000 kvadrataj kilometroj. Samtempe kun energia disvolvo de la grena produkto, la popolo de la tuta provinco plene utiligas la naturajn kondiĉojn por kulturi tropikajn kaj subtropikajn plantaĵojn. En 1971 la produktokvanto de sukercano de Guangdong superis la plej altan nivelon en la historio. La produktokvanto de laktosuko de Hajnan-insulo en 1971 pliiĝis je 7.2% kompare kun tiu en 1970. Oni akiris relative bonan rikolton ankaŭ de agava fibro, fruktoj de oleopalmo, banano, kokoso k.a.



Kampanoj de Donggiāu-komunumo de Venĉang-gubernio rikoltas kokosojn.



Rikoltado de kafgrajnoj






◀ Komunumanoj ŝprucigas insekticidon sur sukerkanojn.

▲ Riĉa rikolto de fruktoj de oleopalmo

▼ Agavoj sur Lejĝou-duoninsulo





Alia riĉa rikolto de bananoj en Majong-komunumo de Dongguan-gubernio

Veteranaj Modeloj de la Industria Fronto

LERTULO DE AFINACIO

Iun antaŭtagmezon en la martinforna laborejo de la Unua Ŝtala Fabriko de la Anŝan-a Fera-ŝtala Kompanio iris demonstrado de rapida afinacio.

Li Ŝaŭkuj kun preskaŭ 50 jaroj estis estro de la demonstra grupo. Kun speciala ĉapo sur la kapo kaj en blanka kanvasa kostumo li direktis laboron ĉe la forno n-ro 6 malgraŭ alta temperaturo. La materialproviza maŝino ĝuste metis ercojn, kalkon kaj eluzitan ŝtalon en la inkandeskan fornon. Li jen atente observis la internon de la forno tra la bluaj okulvitroj, jen prenis aliajn ilojn por miksado de materialoj, forigo de skorio kaj alblovo de oksigeno...

Sonorilo signalis la tempon por elfluigo de ŝtallikvo. Jen ŝtallikvo kvazaŭ akvofalo torentis en tenuojn. La afinacia periodo mallongiĝis je 3 horoj. La rigardantoj laŭdis veteranan labormodelon Li Ŝaŭkuj, ke li ne nur donis brilan ekzemplon de teknika laboro, sed ankaŭ de bona penso kaj bona laborstilo de la laboristaro.

Li Ŝaŭkuj estas fama lertulo de afinacio. 6-foje li feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. En la periodo de restarigo de fera-ŝtala produktado de Anŝan li tage kaj nokte gardis ĉe martinforno, kaj laborante kaj defendante la fabrikon. Li dediĉis la tutan energion al disvolvo de la ŝtala industrio de nia lando, kaj estis elektita kiel eksterordinara labormodelo. Ankaŭ martina forno n-ro 8, ĉe kiu li laboris, fariĝis forno de ruĝa flago de la tuta lando pro la elstara produktado. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, li posteniĝis kiel vicestro de la martinforna laborejo kaj estis elektita kiel membro de la Anŝan-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Post tio li sin tenis ankoraŭ pli modeste kaj ĉiam persistis en partopreno de kolektiva fizika laboro.

La martina forno n-ro 6 estis fame konata kiel postiĝinta forno en la tuta fabriko. Post kiam la entena kvanto de la forno estis pligrandigita, longiĝis la periodo de ĝia afinacio, malmultiĝis ĝia produktokvanto kaj malboniĝis ĝia kvalito, kio malbone influis la produktadon de la tuta fabriko. Por solvi la problemon, sekretario de la partia



Li Ŝaŭkuj (la maldekstra) interŝanĝas sperton de afinacio kun laboristoj.

komitato de la fabriko plurfoje interkonsiliĝis kun Li Ŝaŭkuj, kaj decidis starigi demonstran grupon kun Li Ŝaŭkuj kiel la estro kaj veteranaj laboristoj kaj teknikistoj kiel membroj por trovi metodon de rapida afinacio ĉe forno n-ro 6.

Laboristoj de la taga skipo finis sian deĵoron kaj forlasis la fabrikon, tamen Li Ŝaŭkuj ankoraŭ streĉe laboris ĉe la forno. Li atente observis por trovi la kaŭzon de longa afinaciado kaj iel solvi la problemon. Frumatene de la tago por demonstrado, Li Ŝaŭkuj venis al la laborejo kaj atenteme kontrolis ĉiujn partojn de la forno kaj dekelkajn mezurajn aparatojn. Dank' al klopodo de Li Ŝaŭkuj kaj ĉiuj grupanoj nova rekordo estis kreita per la postginta forno en la unua demonstrado.

Li Ŝaŭkuj tamen ne kontentis pri tio. Sub lia gvido, la grupo afinaciis sinsekvajn dekelkajn fornojn da ŝtalo per la martina forno n-ro 6. Ili eliris kompletan da spertojn de diligenta kontrolo, diligenta analizo kaj diligenta reguligo por venki malfavorajn faktorojn kaŭzitajn de plimultiĝo de la entena kvanto de la forno. Dum la lasta duon-

Li Ĵujhuan (la malantaŭa maldekstra) interkonsiliĝas kun siaj kamaradoj por plibonigi la pordan levmaŝinon.



jaro la martina forno n-ro 6 pliproduktis pli ol 10,000 tunojn da bonkvalita ŝtalo dank' al mallongigo de la afinacia periodo.

NOVA AFERO DE "JUNA LU BAN"*

Sur la staplejo de la Lignaĵa Fabriko de la Pekina Proviza Kompanio de Konstruaj Materialoj, laboristoj estis diskutantaj apud porda levmaŝino. Iu proponis, ke Li Ĵujhuan diru sian opinion. Por solvi la problemon, tiam cerbumis ankaŭ Li Ĵujhuan, kiu faris kontribuon dum konstruado de la Popola Halo kun juna lignaĵista sturma taĉmento sub sia gvido kaj estis alnomata "Juna Lu Ban".

Por liberigi laboristojn de pezaj fizikaj laboroj en amasigo de lignopecoj, laboristoj mem faris pordan levmaŝinon en postlabora tempo dum dekoj da tagoj. Tamen pro manko de paro da glitringaj motoroj oni ne povis funkciigi ĝin. Sed tiajn motorojn oni ne povis tuj akiri kaj atendo de mendo prokrastos la laboron. Kion fari? Por solvi tiun problemon laboristoj diskutis ĉe la porda levmaŝino.

La diskuto de la laboristoj multe inspiris Li Ĵujhuan. Li pensis, ĉu oni ne povas anstataŭigi du glitringajn motorojn per unu ordinara motoro por samtempe movi la radojn de ambaŭ fostoj de la levmaŝino, kaj diris tion al aliaj. Ĉiuj aprobis lian ideon.

Li Ĵujhuan iam lernis en la Postlabora Konstruoinĝeniera Instituto kaj iom konis fizikon, mekanikon kaj matematikon. Li faris simplan kaj facile kompreneblan projektan desegnon kaj elkalkulis diversajn donitaĵojn. Post diskutado, laboristoj opiniis lian projekton plenumbla kaj komencis agi.

Post kelkaj tagoj la motoro estis instalita. Transportistoj komencis facile amasigi lignopecojn en ordo per la levmaŝino. Ĝi ankaŭ povas ŝarĝi kamionojn per lignopecoj. Dank' al ĝia helpo nun laboristoj de unu grupo jam povas facile plenumi taskon, kiun antaŭe ne povis plenumi eĉ tri grupoj. Ankaŭ laboristino povas manipuli la maŝinon. De tiam la plej peza fiziklaboro de la fabriko estas nuligita.

NOVA ATINGO EN STUDIO KAJ PRODUKTADO

Ji Ŝiguan estas membro de la partia komitato de la Dua Ŝtata Ŝpinteksa Fabriko de Ŝanhajo kaj konstanta komitatano de la revolucia komitato de la fabriko. Same kiel multaj aliaj maljunaj laboristoj, ŝi sate suferis subpremadon kaj ekspluaton



de kuomintangaj reakciuloj kaj kapitalistoj en la damninda malnova socio. Post la Liberigo ŝi fariĝis mastro de la lando. Sub la gvido de la Partio ŝi ĉiam diligente laboris kaj akiris elstaran sukceson en produktado, pro kio ŝi estis elektita kiel labormodelo. Ankaŭ la grupo gvidata de ŝi fariĝis avangarda unuo en la ŝpinteksa industrio de Ŝanhajo. La Granda Proletara Kultura Revolucio profunde komprenigis al ŝi, ke nur se oni serioze studas Marksismon, Leninismon kaj Maŭzedongpenson, oni povas persisti en ĝusta politika direkto kaj firme plenumi kaj defendi la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Antaŭ pli ol unu jaro, ŝi faris por si novan planon pri studo de revolucia teorio kaj ĉiutage persiste studis unu horon. Ŝi venkis diversajn malfacilojn, kaj malgraŭ siaj malalta klereco kaj okupateco, finlegis en unu jaro la verkojn *Manifesto de la Komunista Partio, Ŝtato kaj Revolucio* k.a. de Marks, Engels kaj Lenin kaj restudis filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ kiel *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiro*.

La diligenteco de Ji Ŝigjuan profunde kortuŝis ŝian grupon. En tempo de la Printempa Festo de la kuranta jaro ĉiuj kamaradoj de la grupo kolektiĝis por studi partojn de *Manifesto de la Komunista Partio*. Ili komparis la feliĉan vivon gajnitan de la laboristoj sub la gvido de la Partio kun la suferoj en la malnova socio, kritikis Liu Ŝaŭki kaj similajn trompistojn, kiuj intrigas por ŝanĝi la socialisman sistemon de nia lando kaj restarigi la hommanĝan

malnovan socion. Ju pli multe ili studis, des pli klariĝis ilia vido kaj ili decidis ankoraŭ pli diligente klopodi por firmigi la proletaran diktaturon kaj konduki la socialisman revolucion ĝis la fino.

Post kiam Ji Ŝigjuan fariĝis membro de la partia komitato de la fabriko kaj konstanta komitatano de la revolucia komitato, ŝi ĉiam persistis labori kune kun la membroj de sia grupo. Antaŭ nelonge la grupo de Ji Ŝigjuan ricevis taskon produkti fadenojn de 5 specoj kaj krome ŝpini kotonan poliesteran miksaĵon. Antaŭe la grupo nur ŝpinis tri specojn kaj neniam ŝpinis kotonan poliesteran miksaĵon. Iuj timis, ke plimultiĝo de specoj povas kaŭzi “mikson de ŝpinaĵoj” kaj “mikson de eluzita kotono”. Informiĝinte pri tio, ŝi kuraĝigis ilin venki malfacilojn kaj la lastaj eklaboris kun plena memfido. Por garantii bonan kvaliton de la produktaĵo ili markis la ŝpinitajn fadenvolvaĵojn por faciligi postan kontroladon. Krome ili ofte vizitis laboristojn de la posta procedo por peti de ili opiniojn por plibonigi la kvaliton de sia produktaĵo. Dank’ al klopodado de la tuta grupo, ili kreis novan rekordon en produktokvanto kaj levis la kvaliton al nova nivelo.

*Lu Ban estis fame konata lignajisto en la kvina jarcento a. K. kaj rigardata de posteuloj kiel majstro de lignajistoj. Ĉar Li Ŝujhuan estas juna kaj lerta en laboro, oni alnomas lin “Juna Lu Ban”.

Mastroj de Minejo

EN la pasintaj ĉ. 100 jaroj, Kajluan-karbominejo vidis du absolute malsamajn etapojn.

Antaŭ la Liberiĝo, pro rabista ekspluato de imperiismo, Kajluan-karbominejo fariĝis ekstreme kaduka kaj proksimiĝis al morto.


Post la Liberiĝo, Kajluan akiris novan vivon kaj komencis novan etapon. La “ministoj-almozuloj” malestimataj en la malnova socio hodiaŭ

fariĝis ĝiaj mastroj. Nun la tuta mineja regiono prosperas viveplene.

BONA FUNKCIIGO DE LA MINEJO

Post la Liberiĝo, kiam la imperiistoj de Kajluan-karbominejo estis forpelataj, ili asertis arogante: “La ministoj-almozuloj ne kapablas administri minejon. Se ni foriros, Kajluan-karbominejo fermiĝos post 3 monatoj.” La historio

*Purigita karbo de unu el la lavejoj de
Kajluan-karbominejo estas envagonigata.*



Kuracistoj de la minejo ekzamenas pulmajn radiografiojn de ministro.



estas senkompata. Forpasis pli ol 20 jaroj, Kajluan ne fermiĝis, sed pli kaj pli prosperiĝas kaj senĉese altiĝas ĝia produktokvanto. Kajluan-karbominejo jam fariĝis avangarda entrepreno de la karba industrio de nia lando. Multaj el la administrantoj de la moderna Kajluan-karbominejo estas ĝuste "ministroj-almozuloj" en la pasintaj jaroj.

Kamarado Ĝang Gingtang, membro de la konstanta komitato de la partia komitato kaj vicestro de la revolucia komitato de la filia minejo de Magiagoŭ estas unu el ili. La vivo de Ĝang Gingtang en la malnova socio estis tre mizera. Lia patro laboregis la tutan vivon por bienuloj kaj mortis de laciĝo. Por vivteni la patrinon kaj fratineton, Ĝang Gingtang iris al ĝia filia minejo Tangŝan en 1936. En la infero la forta viro transportadis karbokorbojn dum 7 jaroj kaj fosadis karbon dum 5 jaroj kaj fariĝis viva skeleto pro penlaborego. El la 120 ministroj, kiuj komencis labori kun Ĝang Gingtang en la sama jaro, restis nur du homoj. Ankaŭ Ĝang trafis kvar mortajn danĝerojn. Spertinte la mizeron en la malnova socio, Ĝang Gingtang kompreneble tre amas la feliĉan hodiaŭon! Li tutkore sin dediĉas al la konstruado de la minejo. Laboristoj kutimiĝis nomi lin senlaca maljuna minejestro. La filia

minejo Magiagoŭ, kie laboras Ĝang Gingtang, estis fermita de imperiistoj en 1936. Por plene utiligi la subterajn trezorojn de la Patrio, ministroj de Kajluan peneme laboris tri jarojn ekde 1954 kaj revivigis la mortintan minejon. Gvidante ministrojn, Ĝang Gingtang faris multajn renovigojn en disvolvado, tunelado, karbofosado k.a. gravaj ĉeneroj de karboprodukto, dank' al kio la produkto grandskale leviĝas ĉiujare kaj la produktokvanto de la pasinta jaro jam superis la projektitan normon je 60%. Tio estas la plej nova rekordo en la historio de la minejo. Ankaŭ ĉijare la produkto akiris novan disvolviĝon.

Inter la ministroj aperis ne nur multaj administrataj kadroj, sed ankaŭ nemalmultaj teknikaj kadroj. Inĝeniero Oŭjang Gihiu, kiu respondecas pri la teknikaj aferoj de la filia minejo Fangeĝuang, estas maljuna ministro kiu multe suferis de skurĝado kaj bastonado. Antaŭ la Liberiĝo Oŭjang Gihiu estis kulio kiu fosis karbon kaj tiradis karbokorbojn en la galerio Linhi. En la hommanĝa malnova socio lia edzino kaj du infanoj mortis de malsano kaj malsato. Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio savis lin el la surtera infero de la malnova Kajluan. La Partio kaj la popola registaro sendis lin unue en klerigan kurson kaj poste en la Pekinan Ins-

tituton de Minejaj Aferoj. Li kombinis sian riĉan produktan sperton kun la lernitaj teoriaj scioj kaj senĉese faris kontribuojn al la disvolvo de la mineja afero. Post ripetada interkonsiliĝo kun laboristoj kaj teknikistoj, li sukcesis rearanĝi la galeriaron de la filia minejo Fangeĝuang, efektivigis translokigon de tuta karbofoseja transporta maŝinaro sen dispartigo, kio ŝparis al la ŝtato monon kaj altigis la laborefikon je 40%.

Inter la gvidantaj membroj de diversaj niveloj de Kajluan-karbominejo, pli ol 90% estas ministodevenaj kiel Ĝang Gingtang kaj Oŭjang Gihiu. Ili partoprenas kaj gvidas produktadon kaj rejunigis la minejon kune kun la vastaj laboristaj amasoj.


KREI MIRAKLON

Sub la gvido de la Partio, ministoj de Kajluan

reformis malnovajn kaj konstruis novajn ŝaktojn unu post alia. La filia minejo Fangeĝuang ja estas moderna minejo konstruita sur sablejo.

Ĝi situas ĉe la sudorienta rando de la minregiono de Kajluan. En la vastaj galerioj oni instalas fluoreskan lampon po 15 metroj kaj ĝiaj elektraĵoj lokomotivoj estas ekipitaj per altfrekvenca drata komunikilo kaj aŭtomata bloksistemo. Ĉe la karbofosejoj ĉiuj maŝinoj estas novtipaj kaj produktitaj de nia lando. Laboristoj manipulantaj karbofosajn maŝinojn sidas fore kaj je ilia ekpremo de prembutono karbopecoj amase falas en transportan maŝinon kaj estis elportitaj el ŝakto, poste estis mekanike metitaj en vagonojn. Tamen, antaŭ 14 jaroj, tie estis senhoma sablejo, sub kiu kaŝiĝis abunda karbo. Imperiistoj faris tie prospektoradon, sed ili estis timigitaj de la movsabla tavolo kun dikeco de 80 metroj. Ili devis rezigni

Ministoj fosas galerion per malseka borado.



sian ambicion de pirabo de la karba rezervo. Kiam la karba rezervo fariĝis posedaĵo de la popolo, laboristoj decidis venki la movsablajn tavolojn kaj konstrui novajn ŝaktojn.

La laboristoj neniam forgesos la streĉan konstruadon de la ŝaktoj. Tiam estis la jaro 1958. Sub direktado de la brila ĝenerala linio por socialisma konstruado persone ellaborita de Prezidanto Maŭ, la laboristoj kun klara konscienco de mastro de la lando kaj forta deziro de strebado al potenciĝo, disvolvis sian revolucionan energion kaj saĝon. Ili elmetis raciigajn proponojn unun post alia al la komandejo de ŝaktokonstruado. Por venki la movsablajn, ili aplikis novan teknikon de glaciigo por fosado de ŝakto. Dank' al sia riĉa praktika sperto, laboristoj rompis la limigon, ke la longeco de ĉiu masonota parto ne devas superi 20 metrojn kaj longigis ĉiun parton ĝis 38 metroj. En la streĉa konstruado, laboristoj venkis sennombrajn malfacilojn kaj akiris nenombreblajn venkojn. En ŝakto ĉiuhore elŝprucis 140 tunoj da akvo kvazaŭ torenta pluvego, ke la laboristoj apenaŭ povis malfermi la okulojn. Sed malgraŭ tio ili senŝanceliĝe laboradis per pneŭmataj marteloj kaj ĉiu skipo superplenumis sian taskon.

Post penema luktado de 6 jaroj, la filia minejo Fangeĝuang finkonstruiĝis kaj komencis produktadon. Senĉese aperis novaj rekordoj kaj la produktokvanto rapide superis tiun de la projektita normo.

LA VIVO DE LABORISTOJ

Kun la disvolviĝo de la mineja konstruado, ankaŭ la laborkondiĉoj kaj vivnivelo de la ministoj estis multe ŝanĝitaj.

En Kajluan antaŭ la Liberiĝo, ministoj laboris en galerioj sen sekurigaj aranĝoj. Ofte okazis akvoelŝpruco, brulego, gaseksplodo, plafonfalo kaj aliaj akcidentoj. En la periodo de 1905 ĝis 1948, pli ol 5,300 ministoj mortis en galerioj de Kajluan pro akcidentoj, nome unu homo po tri tagoj. Foje, en la filia minejo Tangŝan, unu gaseksplodo mortigis pli ol 430 ministojn kaj la tuta urbo Tangŝan troviĝis en lamento. En la pasinta pli ol duonjarcento, imperiistoj rabis 200 milionojn da tunoj da karbo per ostoj kaj sango de ĉinaj ministoj.

Post la Liberiĝo, la politika pozicio de la ministoj radike ŝanĝiĝis kaj ankaŭ la laborkondiĉoj iom post iom pliboniĝis. La Partio kaj ŝtato prenis la protekton de laborista sano kaj la sekurigan produktadon kiel la plej gravan taskon de la minejoj.

En la tuta minregiono oni konstruis 11 aerumajn ŝaktojn, instalis pli ol 690 ventolilojn, tiel ke ĉiu ministo en la galerioj povas akiri en ĉiu minuto 6-9 kubmetrojn da freŝa aero, anstataŭ la antaŭa malpli ol 1 kubmetron. En kiel ajn fora kaj profunda galerio, ministoj povas akiri sufiĉan freŝan aeron. Antaŭe en galerioj estis neniu senpolviga tublinio kaj ĉiu kubmetro da aero entenis 1,000 miligramojn da polvo. Nun en la galerioj estis instalitaj senpolvigaj tublinioj kun totala longeco de pli ol 100,000 metroj kaj la polvo en ĉiu kubmetro da aero reduktiĝis ĝis 2 miligramoj. En ĉiu filia minejo oni starigis specialajn grupojn kontraŭ brulego kaj akvo, por aerumado, polvomezurado, gasmezuro kaj riparo de galerioj, kiuj tage kaj nokte patrolas en la galerioj. En ĉiu filia minejo oni konstruis por la ministoj ankaŭ grandan banejon kun sulfura baseno kaj ĉambro por sunradia bano.

Komparante la amaran vivon de ministoj en la malnova socio kun ilia nuna feliĉa vivo, oni vidis okulfrapan kontraston. Antaŭ la Liberiĝo oni diris: "La edzo laboras en galerio, edzino almozas sur strato, ĉiam en ĉifona vestaĵo 10-jare portata." Sur stratoj, en kadukaj temploj kaj grandaj kavoj, ĉie kuŝis ministoj senhejmaj. Nun ili ĉiuj loĝas en vastaj kaj helaj domoj. En vespero, kiam ministoj finis sian deĵoron kaj iliaj infanoj venis hejmen de la lernejoj, la laboristaj loĝkvartaloj tuj plenas de ĝojo kaj viveco.

La ministoj stariĝis ne nur en politiko kaj ekonomio, sed ankaŭ en kulturo. Nun pli ol 40,000 infanoj de ministoj lernas en 30 mezlernejoj kaj elementaj lernejoj de Kajluan. Junaj ministoj de Kajluan ĝenerale akiris mezgradan kleracon. Ankaŭ maljunaj ministoj povas legi ĵurnalojn kaj gazetojn post lernado en kursoj kontraŭ analfabeteco aŭ postlabora lernejo. Maljuna ministo Li Zicaj, estro de la tria karbofosejo de la filia minejo Ĝaŭgeĝuang, fariĝis ministo en la aĝo de 12 jaroj, antaŭ la Liberiĝo li ne scipovis skribi eĉ sian nomon, sed nun jam povas legi *Kritikon de Gothaer-programo* kaj aliajn marksismajn-leninismajn verkojn kaj verkojn de Prezidanto Maŭ kaj skribi kritikajn artikolojn. Lastatempe lia filo kaj aliaj pli ol 100 junaj ministoj estis senditaj al superaj lernejoj por studo. Kiel emociiĝis la maljuna ministo. Kun varmaj larmoj en la okuloj li admonis sian infanon: "Neniu el viaj praavoj vizitis lernejon. Vi nepre devas aŭskulti la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj bone mastri sciencajn teknikojn por la revolucio."



RIĈA RIKOLTO DE MARAJ FIŜOJ

Laŭ statistiko de dek apudmaraj provincoj, urboj kaj aŭtonoma regiono en la frua printempo de la kuranta jaro, la marfiŝkapta kvanto de nia lando pliiĝis je pli ol dekono kompare kun tiu de la sama tempo en la pasinta jaro. Tiu kvanto estas plej granda el tiuj de la

lastaj jaroj. Ankaŭ la fiŝbredado en mara kaj dolĉa akvo kaj fiŝkaptado en dolĉa akvo multe disvolviĝis. Tiuj fiŝproduktaĵoj estas transportataj al diversaj lokoj por kontentigi konsumadon de la popoloj.

LA GEKNABA TABLOTENISA TURNIRO DE ĈINIO

En aprilo de 1972, la Tutlanda Geknaba Tablotenisista Turniro okazis en la sporta halo Liaŭning de Ŝenjang. En la turniro partoprenis 415 geknaboj el 29 provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj. Ili estis elektitaj surbaze de vigla disvolviĝo de la tablotenisista sporto en diversaj lokoj de nia lando. Ilia

meznombriga aĝo estas malpli ol 15-jara kaj la plej juna estas nur 9-jara. Inter ili troviĝis 192 knabinaj tablotenisistoj, kiuj unuafoje ĉeestis tutlandan turniron. La turniro revuis rezervan forton de tablotenisista sporto de nia lando kaj pliapaŝe puŝos la sporton de geknaboj rapide antaŭen.



Dum la konkurso Lej Jonglin, sportisto de Liaŭning-provinco, instruas al geknaboj ekzerci viprapon.

Printempo de Antikva Urbo


HANDAN estas malgranda urbo de Hebej-provinco kun historio de pli ol 2,300 jaroj. Antaŭ la Liberiĝo ĝi preskaŭ ne havis industrion, sed nun jam fariĝis nova industria urbo. En 1971 la totala valoro produktita de ĝia industrio kreis rekordon en la historio kaj atingis 2.5-oblon de tiu de 1965 antaŭ la granda kultura revolucio.

Fuŝan-monto en ĝia antaŭurbo abundas je fera erco. En la Granda Proletara Kultura Revolucio ministoj elmetis proponon pri konstruo de kvin grandaj ercopasejoj sur la alta Fuŝan-monto. Tiam iu alportis eksterlandan literaturon kaj diris ke konstruo de tia granda ercopasejo estas senprecedenca. Ministoj diris: “Ferŝtalaj laboristoj devas havi ŝtalan volon. Ni faros kion oni antaŭe neniam

faris, kaj per nia praktiko ni kreos, kion ni ne povas trovi en libroj.” La revolucia komitato de la minejo subtenis la opinion de laboristoj kaj decidis mobilizi amasojn konstrui fer-minejon de Fuŝan-monto per siaj propraj manoj.

Por plirapidigi la konstruadon, laboristoj unue traboris galerion en la monttalo kaj poste fosis la vertikalan parton de malsupre supren. Foje, en la ercopasejo n-ro 4 oni renkontis obstaklon. Komunisto Ju Ŝenggjun, estro de fosista grupo, sentime kunportante acetilenan lampon kaj martelon, eniris la galerion kaj starigis la unuan trabon en la galerio. Sub la influo de Ju Ŝenggjun laboristoj unuanime laboris 16 horojn, forigis la obstaklon kaj ebligis pluan konstruadon de la ercopasejo. En sep mo-

Angulo de la fera minejo de Fuŝan-monto de Handan



natoj ili konstruis kvin ercopasejojn kun profundeco de 150-200 metroj kaj larĝeco de 3.2 metroj kaj antaŭtempe plenumis la planon.

Nun, eĉ kiam nokto falis, kaj vilaĝoj ĉe la montpiedo jam endormiĝis, sur la alta Fuŝan-monto ĉie vidiĝis lamplumoj. La ministoj tage kaj nokte produktis bonkvalitan ercon. La produktokvanto de erco de la urbo en 1971 pliiĝis pli ol 3-oble kompare kun tiu de 1965.


Kun la disvolviĝo de la minejo, mezgrandaj kaj malgrandaj altfornoj kaj konvertoroj estas konstruitaj unu post alia. La produktokvanto de fero de 1971 pliiĝis 1.4-oble kompare kun tiu de 1965.

La antikva urbo fariĝis pli grandioza pro starigo de metalurgia industrio, kaj dekmiroj da ministoj batalantaj en la karbomaro skribis por ĝi novan folion de historio.

Vangfeng-karbominejo estas malnova minejo abunda je karbo. Ĝi estas jam ekspluatita pli ol dudek jarojn, sed ĉe ĝia fundo kuŝas 60% de la karbotavoloj de la tuta minejo. Sub la karbotavoloj estas kalkoŝtona tavolo dika je pli ol 600 metroj, enhavas multe da akvo. Se oni ekspluatus la karbon sur la kalkoŝtono, la subtera akvo tuj ŝprucus el la kalkoŝtono, tial tiu minejo, kiun oni povas ekspluati pli ol 50 jarojn, eniris sian maljunan periodon post ekspluato de nur pli ol 20 jaroj.

La laboristoj de la minejo decidis konkeri la subteran akvon por elfosi karbon. Ili profunde esploris la ŝaktojn, minejajn domojn kaj apudajn vilaĝojn kaj faris multajn prospektoradojn en la mina regiono. Por koni la preforton de la subtera akvo, en 4 sinsekvaj jaroj ili faris diversajn boradojn kaj centojn da eksperimentoj, ricevis fidindajn donitaĵojn kaj finfine trovis rimedon por ekspluati la karbon kun rezervo de 100,000,000 tunoj sur la kalkoŝtona tavolo.

Ankaŭ la disvolviĝo de la Fabriko de Petrolkemiaj Maŝinoj estas okulfrapa. Antaŭ 14 jaroj, la fabriko estis formita el 13 metiaj kooperativoj. Tiam la ekipaĵoj estis tre simplaj, kaj ĉio estis farita per manoj. Nun ĝi fariĝis maŝin-fabriko kun



La sintromaŝino mem fabrikita de la Feraŝtala Fabriko de Handan en produktado

pli ol 170 ilmaŝinoj kaj 1,500-tuna hidraŭlika premaŝino kaj aliaj ekipaĵoj.

Antaŭ la Liberiĝo, tiu antikva urbo ne povis fari eĉ ordinaran kaldronon, sed nun tie estas jam konstruitaj ĉirkaŭ cent grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj maŝinfabrikoj.

La disvolviĝo de industrio de Handan faris gravan kontribuon al la agrikultura meĥanikigo de la apuda kamparo. Fabrikoj de la urbo produktis por la agrikulturaj produktaj grupoj dizelojn, traktorojn, elektrajn motorojn, putofarajn maŝinojn, transformatorojn, pumpilojn, lagrojn kaj aliajn diversajn agrikulturajn maŝinojn kaj akcesoraĵojn, kaj elkulturis pli ol 1,000 teknikistojn.

La nova industria urbo Handan nun disvolviĝas kun senlima juna forto kaj marŝas antaŭen per firmaj paŝoj.

Nova Fizionomio de la Suda Lago


La Suda Lago estas unu el la lokoj, kie okazis la Unua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

En la unua de julio 1921, okazis en Ŝanhajo la Unua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio. Pro traserĉado de malamikoj oni poste translokigis la kunvenejon en kanoton sur la Suda Lago de Ĝiahing-gubernio de Ĝeĝiang-provinco por daŭrigi la Kongreson.

Heredante kaj disvolvante la gloran revolucionan tradicion, la kompartianoj kaj popolamasoj de la regiono de la Suda Lago faris novajn kontribuojn al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio.




Kampanoj de Gaŭĝaŭ-komunumo transplantas rizidojn per iloj faritaj de sia komunumo.



Elektado kaj pakado
de eksportaj ovoĵoj en
la Giahing-a Fridiga
Fabriko.



Kampanoj de Dakiaŭ-komun



Nova generacio de laboristoj en la regiono de la Suda Lago.

Teknikistoj kaj laboristoj de la lagr laborejo de la Gihing-a Fabriko kaj Metalurgiaj Ekipaĵoj kune esploras por plibonigi la kvaliton de sia produktaĵo.

Uzo de elektra plugilo.



La Giahing-a Riparejo de Agrikulturaj Maŝinoj fabrikis nombrojn da malmultekostaj kaj altefikaj malgrandaj rikoltiloj de rizo kaj tritiko.



La Ŝanĝiĝo de Aba

LA Aba-a Tibeta Aŭtonoma Subprovinco situas en la nordokcidenta parto de Siĉuan-provinco en sudokcidenta Ĉinio. Tie serpentumas neĝkovrataj montoj kaj vaste etendiĝas la herbaj marĉejoj. La loko estis unu el la plej malfacilaj regionoj trapasitaj de la ruĝa armeo gvidata de Prezidanto Maŭ en la Longa Marŝo. En la pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo, tie okazis granda ŝanĝiĝo. La antaŭa dezerta Aba jam fariĝis unu el la brutobredaj bazoj de Siĉuan-provinco. Fabrikoj konstruiĝis kaj novaj urboj aperis unu post alia; sur ŝoseoj galopas kamionoj plensarĝitaj de produktaĵoj de agrikulturo, brutobredado kaj industrio; lignoj hakitaj el primitivaj arbaroj estas flose transportitaj al aliaj lokoj tra la riveroj Mingiang kaj Dadu.

La meznombra alteco de Aba-regiono estas je ĉirkaŭ 3,000 metroj. Tie estas tre malvarme kaj seke, la senprujna periodo estas tre mallonga. Antaŭe oni opiniis, ke agrikulturo ne povas tie akiri sian disvolviĝon. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de tibeta kaj aliaj nacioj frakasis katenon de la feŭda servuto, surpaŝis la socialisman vojon kaj fariĝis mastroj de la lando. Apogante sin sur la fortoj de kolektivo, ili disvolvis agrikulturon dum disvolvo de bredado. En la lastaj jaroj, dank' al profunda lerno de Daĝaj, la produktokvanto de greno kreskas senĉese.

Ekde 1967, la brigado Erpulu de Kalaĝu-komunumo de Girĉuan-gubernio jam havas superfluan grenon. En la lastaj 5 jaroj la brigado vendis al la ŝtato sume 160 tunojn da superflua greno, akumulis 70 tunojn da kolektiva rezerva greno, kiu sufiĉas por konsumado de la brigadaj membroj en unu kaj duono da jaroj. La brigado Majvaji de Hongjuan-gubernio antaŭe estis postiĝinta brutobreda brigado. En la Granda Proletara Kul-

tura Revolucio, sub la gvido de komunisto Gaergia, la komunumanoj faris peneman laboradon de tri jaroj, faris grandan fundamentan konstruadon de agrikulturo kaj brutobredado tiel ke la brigado paŝis en vicaron de avangardaj unuoj. En la pasinta jaro la nombro de ĝiaj brutoj estis 164% de tiu antaŭ la kultura revolucio. Dume ili sukcesis en kulturado de sekalo sur la herbejo kun mallonga senprujna periodo. Dank' al tio la agrikulturo kaj brutobredado samtempe ricevis disvolviĝon.

Nun en la subprovinco la produktokvanto de agrikulturo kaj brutobredado havas grandan kreskon kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo: La produktokvanto de greno kreskis je 1.7-oblo kaj la totala nombro de brutoj kreskis je 1.5-oblo.

Sub la gvido de la Partio, la vastaj amasoj de Aba disvolvis ankaŭ lokajn industriojn per siaj propraj fortoj. Laboristoj konstruis cementan fabrikan per simplaj metodoj ĉe la piedo de Minŝan-montaro kaj en la sama jaro jam produktis pli ol 50 tunojn da cemento. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la laboristoj de tiu ĉi fabriko mem konstruis pliajn fabrikajn domojn. En la komenca periodo de konstruado ĝi havis nur 8 maŝinojn, sed nun ili jam nombriĝas 106. Pli ol 90% de la laborspecoj de la fabriko estis certgrade mekanigitaj kaj la jara produktokvanto atingis dekmil tunojn.

Nun ĉiuj gubernioj de la subprovinco Aba starigis riparajn fabrikojn de agrikulturaj maŝinoj, prilaborejojn de greno, oleo, krommanĝaĵo kaj lokaj specialaj produktaĵoj; nemalmultaj distriktoj, komunumoj kaj brigadoj starigis malgrandajn fabrikojn de agrikulturo, fero kaj kemisterko, malgrandajn karbominejojn kaj malgrandajn hidroelektrejojn. Pli ol 60% de la brigadoj de la sub-

provinco jam uzas elektron kaj 70% de la brigadoj havas dratan disaŭdigon. Antaŭ la Liberiĝo Aba ne povis produkti eĉ falĉileton kaj alumeton, sed nun ĝi jam povas produkti pogrande elektrajn motorojn, hidroturbinojn, buterapartigilojn kaj aliajn maŝinojn bezonatajn de agrikulturo kaj brutobredado. Krome oni ankoraŭ produktas laktopulvordon, ledon, fritilarion, vegetalan raŭpon (*Cordiceps Sinensis*), junan cervokornon, moskon kaj aliajn multevalorajn drogojn. Sur la neĝaj montoj kaj herbejoj oni konstruis ŝoseojn kun longeco de pli ol 2,800 kilometroj, tiel ke granda parto de la lokoj en la subprovinco estas atingeblaj per aŭtoj.

Kun la disvolviĝo de industrio, agrikulturo kaj trafiko, rapide ŝanĝiĝis la estiĝinta fizionomio de kulturo, edukado kaj higieno de la subprovinco. Antaŭ la Liberiĝo la vasta Aba havis nur unu mezlernejon kaj kelkajn elementajn lernejojn servantajn al gesinjoridoj de brutoposedantoj kaj feŭdaj regantoj. Nun la subprovinco havas 19 mezlernejojn kaj 1,287 elementajn lernejojn, kaj preskaŭ ĉiuj tieaj lernoĝaj geknaboj havas ŝancon por lernado. Antaŭe ĉi tie ne troviĝis eĉ unu hospitalo, sed nun ĉiuj gubernioj havas hospitalon kaj ankaŭ distriktoj kaj komunumoj havas hospitalon aŭ sanitarajn, kaj brigadoj ĝenerale starigis kooperan kuracan stacion. Pli ol 4,000 medicinaj laborantoj servas al la vastaj amasoj kaj efike protektas sanon de la diversnaciaj popolanoj.

“La unuiĝo de la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj nacioj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra triumfo de nia afero.” Observante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ, diversnaciaj popoloj de Aba strikte unuiĝis en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, batalas ŝultron ĉe ŝultro kaj akiris venkojn unu post alia.


En Lihian-gubernio en la valo de Minŝan-montaro estas du montvilaĝoj. Unu estas Huodi, kie loĝas Kiang-nacianoj kaj la alia estas Erbu, kie loĝas tibetanoj. En la malnova socio, pro agitado de bienuloj kaj kuomintangaj reakciuloj, inter la du popoloj troviĝis profunda konflikto. Post la Liberiĝo, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la amasoj de ambaŭ vilaĝoj unuiĝis, faligis bienulojn kaj feŭdajn regantojn kaj kune suriris la vojon de kolektivigo. Kiam stariĝis la popola komunumo, la amasoj de ambaŭ vilaĝoj memvole organizis sin en saman brigadon kaj helpas unu la alian kaj en politiko kaj en produktado. Iun printempon, ĝermoj de la grupo Huodi estis


forportitaj de pluvego. Kadroj kaj komunumanoj de la grupo Erbu tuj venis por helpi. Ili kune riparigis la detruitajn kampojn, refoje semis kaj fine akiris venkon de batalo kontraŭ la katastrofo. Erbu ne havas sufiĉan laborforton, kaj komunumanoj de Huodi iras helpi por rikolto ĉiun aŭtunon.

En la subprovinco sane kreskas la nacimalplimultaj kadroj. Adeng, vicestro de la revolucia komitato de la subprovinco, estas tibetano, deveninta de liberigita servutulo. Nun la nacimalplimultaj kadroj posedas pli ol 70% de la kadroj de la tuta subprovinco.

Antaŭe ili estis sklavoj kaj nun mastroj de la lando. La vastaj amasoj de liberigitaj servutuloj de tibeta kaj diversaj nacioj laŭte kantas:

*Sub la ruĝa suno brilas ore l' Neĝaj Montoj,
La herbaro kreskas sub la pluvo, roso, sunradio,
Liberiĝis dank' al Prezidanto Maŭ la malriĉuloj,
Aba ŝuldas la feliĉon nunan al linio lia de revolucio.*





IRANTE suden de la urbo Hining de Kinghaj-provinco de nia lando laŭ ŝoseo kaj transveturinte la krutan Buking-monton, ni atingis Maduo-stepon pli ol 4,000 metrojn super la marnivelo. Maduo en la tibeta lingvo signifas fonton de la Flava Rivero. Tiu ĉi gubernio havas nur kelkmil loĝantojn, sed ĝia areo estas pli ol kvardek mil kvadrataj kilometroj.

Nun tiu paŝta gubernio posedas pli ol kvincent mil brutojn, kiuj estas kvinoblo de tiu de 1959, kiam fondiĝis la popola komunumo. La paŝtistoj de la tuta gubernio havas meznombre po pli ol 140 brutojn. Sekve de la senĉesa disvolviĝo de produkto la tibetaj paŝtistoj de Maduo-stepo faras pli kaj pli grandan kontribuon al la ŝtato, kaj ilia vivo estas pli kaj pli abunda. En la pasinta jaro ili provizis al la ŝtato brutajn produktaĵojn kostantajn pli ol 2,500,000 juanojn, t. e. 14-oblo de tiu de 1959 kaj 4.5-oblo de tiu de 1965. Ĉiuj brigadoj de la gubernio havas sian akumulitan fonduson, la totala sumo atingis pli ol 4,700,000 juanojn, el kiuj ĉiuj komunumanoj povas ricevi po pli ol mil juanojn. La kolektiva ekonomio pli kaj pli fortiĝas, kaj la enspezo de komunumanoj altiĝas jaron post jaro.

Antaŭ la Liberiĝo Maduo-stepo estis mizera. Tiam reakciaj feŭdaj paŝtaj mastroj kaj kuomintangaj banditoj de Ma Bufang en koluzio kondukis kruelan regadon al paŝtistoj, la paŝta produktado velkis kaj la loĝantaro malmultiĝis. Laŭ rememoro de maljunaj paŝtistoj, Ma Bufang-banditoj tie faris sepfoje buĉadon kaj rabadon. Maduo fariĝis sovaĝejo frekventata de lupoj. En 1949, la Popola Liberiĝa Armeo aliris Kinghaj-altebenejon,

kaj nur tiam la mizerplena popolo de Maduo vidis sunbrilon.

En la komenca periodo post fondiĝo de la popola komunumo, en Maduo-gubernio estis nur malpli ol 120,000 brutoj, kaj en la paŝta produktado kaj vivo de la tibetaj paŝtistoj ankoraŭ ekzistis multaj malfaciloj.

Antaŭ la Liberiĝo, la sesa produkta grupo de la komunumo de Ĝaling-lago de ĝi havis nur pli ol 30 familiojn, el kiuj la paŝtistoj de 18 familioj estis sklavo de brutoposedantoj, kaj paŝtistoj de 12 familioj sin vivtenis per paŝtado de luitaj brutoj. Post la Liberiĝo ili stariĝis en politiko, sed havis ankoraŭ multajn malfacilojn en ekonomio. Kjongguan, la nuna alterna membro de la provinca komitato de la Kompartio kaj sekretario de la partia filio de la sesa produkta grupo, tage laboras kaj vespere interparolas kun komunumanoj por venki la malfacilojn. Sub la gvido de Kjongguan, la komunumanoj konkeris diversajn malfacilojn. Ili ĉefe manĝis viandojn de bestoj kaj sovaĝaj birdoj por laŭeble ne buĉi brutojn.

En la vintra komenco de 1964, subite okazis neĝoŝtormo kaj la stepo estis kovrita de neĝo kaj glacio, pro kio mankis herboj al la brutoj. Kjongguan mobilizis amasojn por batali kontraŭ neĝoblovo kaj konstrui stalojn por ŝirmi la brutojn de vento kaj frosto, kaj forigi neĝon sur la tero per tabulo, por ke la brutoj povu manĝi herbojn. En frostaj noktoj, kiam falas neĝflokaj, multaj komunumanoj brakportis malgrasajn ŝafojn en siajn varmajn tendojn. Krome, ili zorge flegis la ŝafidojn. Post nutrado kaj flegado de vintro kaj printempo,

la sesa grupo ricevis bonan sukceson, ke pli ol 98% de la brutoj kaj ŝafidoj sukcese postvivis.

En la fino de 1971, la totala sumo de brutoj de la sesa grupo pliiĝis je pli ol 6-oblo kompare kun tiu de la komenca periodo de fondiĝo de la komunumo, la akumulita fonduso de la grupo nombriĝis pli ol 120,000 juanoj, kaj pli ol 90% de la familioj havas deponitan monon. La malriĉa grupo fariĝis riĉa. Kiam ni vizitis la sesan grupon, ni vidis, ke multaj paŝtistoj loĝas en grandaj tendoj, en kiuj estas sufiĉe multe da viando, butero kaj diversaj vestaĵoj.

Kun la senĉesa plimultiĝo de brutoj, la problemo de postĝinteco de produktaj instrumentoj kaj manko de produktaj fortoj fariĝis pli kaj pli

elstara. Unu paŝtisto devis paŝti pli ol cent bovojn aŭ mil ŝafojn. Unu laboranta virino devis melki pli ol 30 bovinojn. Dum la sezono de lantondo unu lantondisto devis meznombre tondi lanon de 2,000 ŝafoj, sed la instrumentoj uzataj de ili estis tre simplaj. Tio malhelpis la altiĝon de la produkto de bruta bredado. La grupo unue aĉetis buterigilon kaj lernigis al paŝtistoj uzi ĝin por apartigi buteron. Tio estas bonvenigata de paŝtistoj. Post vasta apliko de buterigiloj, la grupo paŝon post paŝo aĉetis aliajn maŝinojn. Nun en la tuta gubernio meznombre por du gregoj da bovinoj estas donita unu buterigilo, kaj ĉiuj grupoj havas elektrajn lantondilojn. En la preventado de malsanoj de brutoj, la komunumanoj ricevis bonan efikon de preventado per medikamenta nebulo.

Ĉinaj Sondiskoj:

Fortepiana Konĉerto "La Flava Rivero"

Fortepianisto — Jin Ĉengĝong

Akompananto — la Simfonia Grupo de la Centra Muzika Trupo

Direktanto — Li Delun

Verkita de la Centra Muzika Trupo

Por koni ĝian enhavon legu la artikolon "Fortepiana Konĉerto *La Flava Rivero*," p. 9, n-ro 5, EPC. 1972.

Sur unu sondisko (33¹/₃), kun diametro de 25 centimetroj

Eldonitaj de la Ĉina Sondiska Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj),
P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio

La Glora Korea Popola Revolucia Armeo

LA 25-a de aprilo de la kuranta jaro estis la 40-a datreveno de la fondiĝo de la Korea Popola Revolucia Armeo. En la tago antaŭ kvardek jaroj, sub la persona gvido de la granda gvidanto de la korea popolo kamarado Kim Il Sen, glorie

naskiĝis la unua revolucia armita forto — la Korea Popola Revolucia Armeo.

Depost sia fondiĝo, la Korea Popola Revolucia Armeo alte tenis la grandan standardon de

Milita ekzerco



opono kontraŭ la japana imperiismo kaj batalo por naciliberiĝo. Sub la gvido de kamarado Kim Il Sen, la armeo kune kun sia popolo heroe bataladis 15 jarojn apogante sin sur la propraj fortoj kun firma revolucia spirito, renversis la japanan faŝisman koloniisman regadon kaj fondis la Demokratian Popolan Respublikon de Koreio, per kio ĝi faris senmortan meriton por la korea popolo. En februaro de 1948, la Korea Labora Partio transformis la Popolan Revolucion Armeon en la nunan Korean Popolan Armeon.

La Korea Popola Armeo heredis kaj disvolvis la gloran tradicion de la Popola Revolucia Armeo. En la granda Patrolanda Liberiga Milito por rezisti kontraŭ la agreso de la usona imperiismo, sub la gvido de la Labora Partio kaj kamarado Kim Il Sen, la Korea Popola Armeo faris sangan batalon de pli ol 3 jaroj en solida unuiĝo kun sia popolo, venkis la arogantan barbaran usonan imperiismon kaj defendis la revolucion frukton de la Patrolando.

Nun, aktive partoprenante la ekonomian kaj nacidefendan konstruadon, la heroa Korea Popola Armeo energie efektivas la principon elmetitan de k-do Kim Il Sen: “La armeo kadriĝu kaj modernigu, la tuta popolo armiĝu kaj la tuta lando fortikajiĝu”, ĉiam singardas kontraŭ agresa intrigo de la usonaj kaj japanaj reakciuloj kaj la marioneta kliko de Pak Ĝen Hi kaj firme defendas la sekurecon de la socialisma patrolando, kun pafilo en unu mano kaj martelo kaj falĉilo en la alia.

La popoloj kaj armeoj de Ĉinio kaj Koreio formis grandan amikecon el sango en la batalo kontraŭ la komuna malamiko. Dum la jaroj de rezistmilitoj kontraŭ la japana imperiismo kaj usona imperiismo, ili fariĝis intimaj amikoj, kiuj batalis ŝultron ĉe ŝultro, bone kunagis, dividis inter si ĝojon kaj suferon kaj vivis saman sorton. En la estonto, la popoloj kaj armeoj de Ĉinio kaj Koreio ĉiam unuiĝos, kune batalos kaj kune venkos en batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj japana militarismo.

KPA-anoj kantas revolucion kanton por kamparanoj ĉirkaŭ sia garnizonejo.





Soldato de la Korea Popola Armeo singardeme defendas limon de la patrolando.

Rememoro pri la Koreaj Kunbatalantoj

HU KIKUN

JE la 25-a de aprilo antaŭ 40 jaroj, la granda gvidanto de la korea popolo kamarado Kim Il Sen kreis la unuan revolucionan armitan trupon de la korea popolo — la Korean Popolan Revolucionan Armeon. En la pasintaj 40 jaroj, la heroo korea popolo kaj la koreaj popolaj revoluciaj armitaj fortoj gajnis multajn brilajn venkojn en sia batalo kontraŭ la agreso de la japana imperiismo kaj usona imperiismo, alte tenante kontraŭimperiisman kaj revolucionan standardon. Nun la Korea Popola Armeo, kiu heredis kaj disvolvis la gloran tradicion de la Korea Popola Revolucia Armeo, jam disvolvigis en pli potencajn revoluciajn armitajn fortojn, fidele defendas la revoluciajn fruktojn de la korea popolo kaj faras sian grandan kontribuon en defendo de la paco de la Malproksima Oriento kaj la mondo, gardante ĉe la orienta kontraŭimperiisma fronto.

En la tempo, kiam ni kaj niaj karaj koreaj kunbatalantoj kune celebris tiun gloran feston, mi ekpensis pri la neforgeseblaj tagoj de 1971 dum la vizito de la Ĉina Ĵurnalista Delegacio al Koreio. Tie ni ne nur propraokule vidis la heroecon de la frata korea popolo montritan en la socialisma konstruado, ĝian grandan volon de sinapogo sur la propraj fortoj kaj de batalo kontraŭ malfaciloj kaj ĝiajn brilajn atingojn en diversaj frontoj de la nacia ekonomio, sed ankaŭ informiĝis pri la brava batalo kondukata de la heroo Korea Popola Armeo kontraŭ la usona imperiismo, japana militarismo kaj la pupa kliko de Pak Ĝen Hi kaj pri ĝiaj senmortaj meritoj en defendo de la patrolando kaj la paco de la Malproksima Oriento kaj la mondo.


En mia cerbo ofte aperas la sceno de nia intervidiĝo kun KPA-kunbatalantoj tage kaj nokte gardan-

taj sur la pozicio sur la monto De Duk Ŝan ĉe la norda latitudo 38°. Ilia alta respondeco kaj revolucia singardemo por defendi la patrolandon profunde nin impresis. Tiu pozicio distancas de Seulo regata de la usona imperiismo kaj la kliko de Pak Ĝen Hi je nur kelkdek kilometroj, inter iliaj postenoj kaj la redutoj de la uson-pupaj reakciuloj kuŝas nur milita dividlinio. Depost la korea armistico, la usona imperiismo kaj la pupa kliko de Pak Ĝen Hi

faris sennombrajn frenezajn militajn provokojn kaj subfosadojn kontraŭ ili, sed la koreaj kunbatalantoj kun alta singardemo ĉiam fiaskigis la krimajn intrigojn de la malamikoj. La gardantaj KPA-anoj bone konas ĉion de De Duk Ŝan, kaj en ĉia ajn vetero ili povas trovi ĉiun suspektindaĵon. La grupo de batalanto Liu Haŭ Gu rimarkis, dum sia patrolado en pluva nokto, ekflugantan fazanon surprizitan. Post atenta observado kaj serĉado,

la grupo trovis aron da spionoj, kiuj intencis enŝteliĝi en la regionon De Duk Ŝan por subfosado, kaj senhezite ekstermis 6 spionojn antaŭ sia pozicio. La taĉmento de vicsubplotonestro Han Jon Ĉel rimarkis dum sia patrolado, ke kelkaj fragmitoj svingiĝas en kvietaj fragmitejoj, suspektis ke tie aktivas malamikoj, kaj post serĉado ili sagace kaptis spionon sin kaŝantan en la fragmitejo, kiu intencis enŝteliĝi en la nordan parton de la respubliko por subfosado. Depost februaro 1963, la alte singardemaj kaj sagacaj KPA-anoj gardantaj sur la monto ekstermis kaj kaptis pli ol 80 malamikajn spionojn kaj faris multajn heroaĵojn.

Mi ne povas forgesi ankaŭ la varman scenon dum nia intervidiĝo kun kamaradoj de la korea popola mara armeo en bazloko ĉe la korea orienta marbordo. Tiun tagon blovis forta vento. La komandanto, politika ko-



Militboato de la Korea Popola Armeo en patrolado



GONG KI

EN la Amikeca Magazeno de Ŝanhajo estas montritaj diversspecaj varoj kaj multaj fremdlandaj amikoj vizitas ĝin por aĉeti siajn ŝatatajn objektojn.

Mi servas kiel interpretisto en la magazeno. Iun tagon kiam mi interpretis al amikoj el la Ekvatora Gvineo la tekston de revoluciaj kantoj sur gramofondisko, min vokis iu ĉe la najbara vendotablo de elektraj aparatoj. Mi turnis min al ĝi kaj trovis ke tie staras kelkaj afrikaj junuloj, el kiuj iu fortikulo elprenis transistoron el sia leda sako, metis ĝin antaŭ vendisto Ŝen kaj diris kun rideto: “La transistoro ne funkcias. Bonvolu

ĝin ekzameni.” Mi alproksimiĝis kaj rekonis ke la 8-transistora radioricevilo kun marko Hongqi estas produktita de Ĉinio. Vendisto Ŝen malfermis ĝin, kaj almetis pilojn por kontroli. Post la detala esplorado de la linioj, li ankoraŭ ne trovis, kiu parto estas difektita. Tion vidinte, la fremdlanda amiko maltrankviliĝis kaj ekrakontis al ni pri la transistoro: Antaŭ tri jaroj, lia pliĝa frato, kiu estas gerilano, aĉetis ĝin en la magazeno. En batalado ĝi paneis pro forta skuado de obuso. Profitante la ŝancon viziti Ĉinion li kunportis ĝin por riparigi. Hodiaŭ li venis al Ŝanhajo kaj foriros morgaŭ matene. Ĉe tio li elpoŝigis ledmonujon kaj montris foton el ĝi. Li diris: “Jen estas mia



misaro kaj marsoldatoj de la bazo ĉiuj kolektiĝis sur la kajo por nin bonvenigi. Ni vizitis en akompano de kamarado komandanto militŝipojn pretajn al batalo kaj honore kunsidis kun 5 herojoj, kiuj kaptis la spionan ŝipon Pueblo de la usona imperiismo. Ni estis forte kortuŝitaj de ilia varma amo al la patrolando, senkompara malamo kontraŭ la usona imperiismo kaj ilia heroa spirito kuraĝe batali por akiri venkon kaj venki multajn per malmultaj, fortan per malforta. Ĝuste kun tia spirito, 7 herojoj marsoldatoj kun ordinara malgranda militboato kaptis armitan spionan ŝipon kun modernaj ekipaĵoj multe pli grandan ol la sia, ekstermis kaj kaptis 83 usonajn entrudiĝintojn. La vortoj diritaj de la komandanto de tiu bazo en la kunsido ĝis nun ankoraŭ firme teniĝas en mia cerbo. Li diris: “Ni estas multe malplibone armitaj kaj ekipitaj ol la usonaj imperiistoj. Sed nia popolo kaj niaj batalantoj kuraĝas batali kaj venki, kaj estas sentimaj al perforto kaj vivofero, kio estas nia supereco en monopoleco. Nur kun tia spirito, la revolucia popolo de malgranda lando certe povas venki agreson de granda lando, armeo malbone ekipita povas venki armeon bone ekipitan.

Por la revolucia popolo ĉia ajn malamiko povas esti venkita.” Ni sentas fieron pro tio ke ni havas kunbatalanton kiel la Korean Popolan Armeon kiu kuraĝas batali, kuraĝas venki kaj faris multajn meritojn.

Dum nia vizito en Koreio, ni vidis ke la komandantoj kaj batalantoj de la Korea Popola Armeo faras politikan edukon kaj streĉan militan trejnadon dum sia singardema defendo de la tera, mara kaj aera teritorioj de la patrolando por plialtigi sian batalforton. La junaj kursanoj de la oficirotrejna taĉmento, ĉiuj trafis la celtabulojn en sia pafekzerco. Ni informiĝis, ke iuj trupoj de la popola armeo plenumis en 4 monatoj planon de duon-jara trejnado, la procento de trafaj pafoj atingis 98%. Obervante instruojn de la granda gvidanto kaj plej alta komandanto de la korea popolo kamarado Kim Il Sen, la komandantoj kaj batalantoj de la tera, mara kaj aera trupoj de KPA konstruis la heroan KPA en armeon, kiu ricevis plian hardon en politiko kaj ideologio kaj milita tekniko kies ĉiu ano povas labori kiel kadro. Ĝi jam fariĝis nevenkebla revolucia armita forto kun potencaj atakaj kaj defendaj rimedoj.

pliĝa frato!” En la foto estas nigrula batalanto kun karabeno en la manoj kiu staras fiere ĉe faliĝinta helikoptero. Rigardante lian vizaĝon, mi sentis kvazaŭ mi vidis lin ie. Subite mi ekmemoris kaj ekstervole kriis: “Ĉu tiu ne estas Risda!” La junulo ridetis al mi, kaj la renkontiĝo antaŭ tri jaroj denove aperis antaŭ miaj okuloj...

En iu tagmezo de frua printempo, iu altstatura nigrula amiko venis en nian magazenon. Li paŝadis tien kaj reen kaj ĵetis senĉese rigardon al vendotabloj. Mi tuj alproksimiĝis al li kaj ni ekparolis intime.

“Mi nomiĝas Risda kaj estas mozambikano,” li memvole sin prezentis. “Multfoje mi vizitis la popolan Ĉinion, kaj via revolucia batalado komprenigis al mi multajn revoluciajn verojn dum vizitado. Antaŭe, mi pensis, kial ni vivas en suferado de generacio al generacio, kaj eĉ la nuna generacio estas daŭre subpremata kaj ekspluatata de imperiistoj kaj koloniistoj? Ĉu la sorto de ni nigruloj devas esti tiel difinita?” Mansvingante li diris emocie: “Ne, tute ne! Nun mi jam komprenis ke la unika vojo por liberigi nin de la subpremado kaj ekspluatado estas batali kontraŭ koloniismaj regantoj kaj depreni de ili niajn fruktojn.” Dirante tion li apenaŭ povis sin deteni de forta ekscitiĝo kaj daŭrigis: “Por gajni ekzistan rajton de nia nacio mi decidis post mia hejmeniro partopreni en batalo por liberigi la patrion kaj forpeli portugalajn koloniistojn, kiuj senbride piedpremas mian belan patrion!”

Liaj bravaj vortoj vekis ĉe mi profundan respekton al li. Antaŭ ol mi ekparolis, li demandis min: “Hodiaŭ vespere mi foriros de via lando. Mi volas kunporti ion de Ĉinio kiel memoraĵon. Kion mi devas elekti laŭ via opinio?” Tiam mi ne povis tuj doni al li ideon. Mi do akompanis lin rigardi ĉiun vendotablon.

Kiam ni atingis vendotablon de elektraj aparatoj, tie du vjetnamaj amikoj estis elektantaj transistoron. Li turnis al mi la kapon kaj diris: “Transistoron mi aĉetu! Ĝi ne nur taŭgas por kunportado sed ankaŭ ebligas al mi aŭskulti novaĵon el Ĉinio.” Mi tiam esprimis aprobon kaj komencis elekti por li. Post kelkaj minutoj, li subite ĵetis sian rigardon al tia transistoro kian la du vjetnamaj amikoj aŭskultas, kaj diris al mi: “Al mi tre plaĉas tia kun inkrustaĵo de ruĝa flago, ĉar ĝi estas signifo plena de revolucio.” Mi tuj petis vendiston Ŝen por ke li montru alian. Tiel la transistoro estis alportita de Risda al fronto de la batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo.

Kiam mi dronis en rememoro, min tuŝis vendisto Ŝen per sia mano kaj diris kun ĝojo: “La laŭtparolilo difektiĝis. Laŭ mia opinio ni devas anstataŭigi ĝin per nova.”

La magazeno nur vendas, sed ne riparas, kiel ĝi povas havi superfluan laŭtparolilon por ĝin anstataŭi? Pensis mi. Sed Ŝen jam prenis samtipan transistoron kaj diris: “Ni anstataŭigu la difektitan per tiu en ĝi, kaj poste ni petu fabrikon meti al ĝi alian.” Mi kapjesis kaj laŭdis lin en koro pro lia bona ideo. La laŭtparolilo estis rapide instalita kaj la transistoro denove ekfunkciis. Tiam la junulo varme manpremis kun mi kaj vendisto Ŝen por esprimi sian dankon.

Mi diris emocie: “Kara amiko, transdonu nian plej intiman saluton al via frato Risda kaj la heroaj gerilanoj de Mozambiko.”

“Multajn dankojn! Mi certe tion plenumos.”

Poste tiuj afrikaj amikoj adiaŭis nin foje kaj refoje mansvingante.

Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon
de

Radio Pekino

Por Eŭropo

GMT	Vendredo k Sabato 20:00—20:30
Ondoj(m)	47 45 31 25


Por Japanio, Koreio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 19:00—19:30
Ondoj(m)	47 40

Por Sudorienta Azio


Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 20:30—21:00
Ondoj(m)	25 19

Novaj Produktaĵoj kaj Ekipaĵoj




La Baŭding-a Transformatora Fabriko faris kontrol-
ebla-silician ŝargitan reguligan transformatoron, kaj
per tio liveris utilan sperton en uzo de kontrolebla
silicio por produkti ŝargitan ŝaltilon de nia lando.

La Ŝenjang-a Fabriko de Minejaj Maŝinoj mem projektis kaj faris vakuan filtrilon taŭgan por uzado de ĉinaj minejoj.






La Pekina Mezur-
nstrumenta Fabriko
provfabrikis radian
frekvencan ŝprucigi-
on, per kiu oni pro-
duktas dielektrikan
membranon de alta
fandopunkto kaj mal-
facile fandeblan meta-
lan membranon. Jen
teĥnikisto kaj laboris-
toj reguligas la maŝi-
non.




Ercodispecigaj maŝi-
noj produktitaj de
la Ŝanhaja Pezmaŝi-
na Fabriko atendas
transportadon.



La Ŝanhaja 13-a Trikejo projektis kaj faris elektran Jacquard-an veftan trikmaŝinon, kiu povas produkti trikajon kun relative granda, klara kaj bela desegno.

La Vuhan-a Kemiindustria Instituto sukcese elfaris kemiaĵon por altigo de akvotemperaturo en kulturado de rizplantoj, utilan por kulturaj durikoltan rizojn en unu jaro.



Lastatempe Ŝanhajo produktis kudromaŝinon por hejma uzo. Ĝi estas simpla, bonefika, malmultekosta kaj bone akceptata de la amasoj.





Helpate de sciencesploraj unuoj, la Ŝanhaja Maŝin-fabriko "Aŭroro" sukcese provfabrikis grandan altvakuan multtavolan kovrigilon.



Ni tre ĝojas publikigi ĉi-sube leteron de nia finnlanda amiko Pentti Tormala, kaj ni ankaŭ profitas la nunan okazon sendi al li kaj ĉiuj membroj de la Esperanto-klubo de la loka sekcio de Finnlanda-Ĉina Societo en Tampero niajn korajn salutojn. Ilia agado certe faros valoran kontribuon al la amikeco inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj Finnlando. Per aera poŝto ni jam sendis al ili niajn gazetojn kaj aliajn Esperantajn eldonaĵojn.

Ni kredas, ke multaj el niaj legantoj trovos tiun ĉi leteron interesa. Estas sendube, ke se niaj legantoj en aliaj landoj entreprenos, laŭ ebleco, similan agadon, tio definitive utilis al nia interkompreniĝo kaj amikeco kaj al nia justa laboro per Esperanto en la intereso de diverslandaj popoloj. Ĉi-rilate ni deziras aŭdi iliajn bonajn opiniojn kaj proponojn.

La redakcio

EL POPOLA ĈINIO

P. O. Kesto 77

Pekino

Ĉinio

Kun admiro por via (kaj nia) gazeto EL POPOLA ĈINIO mi salutas vin per ĉi tiu letero, kiu esprimu mian aprezon al ĈINA ESPERANTOLIGO, kiu funkcias efike kaŭzante bonajn rezultojn por Esperantio.

Ĉi tie, en urbo Tampero, funkcias nun Esperanto-klubo por via gazeto, ĉe la loka sekcio de Finnlanda-Ĉina Societo. En la fonda kunveno aliĝis en la klubo 12 membroj, i.a. la prezidanto kaj sekretario. Ni volas studi Esperanton kaj per ĝi atingi eblon pli bone konatiĝi kun Ĉinio precipe per via gazeto, sed ankaŭ per ĉina Esperanta alia literaturo. En la klubo apartenas 4 personoj, kiuj jam antaŭe scipovas Internacian Lingvon, kaj 8 personoj, kiuj estas komencantoj en ĉi tiu afero.

Oni faris jam multajn proponojn por disvastigi kaj plibonigi plu nian funkciadon. Ĉi tiu devus esti kiel gvidstelo por esperantistoj kaj la amikoj de Ĉinio, por ke ili kooperu kaj kune atingu pli bonajn rezultojn por ambaŭ ideoj, ĉar tiel postulas jam praktikaj kaŭzoj. Ekz. nun la sekcio ricevis novajn vizitantojn, kiuj ĝis nun ne vizitis la kunvenojn.

La naciaj lingvoj estas ĉiam malfacilaj por la lernado de la eksteruloj. Ĉe la sekcioj de Finnlanda-Ĉina Societo funkcias en du urboj studkluboj por la ĉina. En la aliaj lokoj apenaŭ ekzistas ebloj por ĉi tiu bona agado, ĉar en nia lando estas tre malmulte da personoj, kiuj scipovas vian nacian lingvon. Tamen estus pli bone, se multaj homoj povus scipovi la ĉinan. Nu, ĉe ĉi tiu lingva baro restas unu bona solvo, ĉar ni ne povas rekomendi, ke homoj por konatiĝi kun Ĉinio unue lernu ekz. la anglan, kiu ankaŭ estas malfacila lingvo.


Oni proponis, ke ni petu senpagajn specimenajn ekzemplerojn. Ĉi tie mi sendas al vi la adresojn kun la nomoj por niaj membroj, kiuj ankoraŭ ne abonis la gazeton. Gestudentoj havas ofte monajn ĝenaĵojn. (Nomoj kaj adresoj ĉi tie estas ellasitaj pro malplilongigo — la redakcio.) La aliaj jam abonis la gazeton, iuj eĉ por tri jaroj.

Vivu la granda Prezidanto Maŭ Zedong!

Vivu nia amikeco kun Ĉinio per la Internacia Lingvo.

Kun printempaj salutoj

Pentti Tormala (la studgvidanto)
Pattiniemenkatu 2 B 3
SF-33250 Tampero 25
Finnlando



Kore-nacia Kantistino

Huang Jinsun

EN vagonaro veturanta de Gilin al Pekino kore-nacia junulino kantis al pasaĝeroj *Janbian-aj Popolanoj Amas Prezidanton Maŭ*, kiu esprimis sinceran kaj profundan amon de la Janbian-anoj al Prezidanto Maŭ. Aŭskultante ŝian kantadon, la pasaĝeroj pretervole ekkantis kune kun ŝi:

*La ruĝa suno en la fund' de nia koro
Ruĝigis la limregionon en prospero.
Ĉangbaj-montaro plenas je kantosonoro,
Dum ruĝaj flagoj flirtas ĉe Hajlan-rivero.*

La junulino nomiĝas Huang Jinsun. Ŝi estas kantistino de la ensemblo de Hehin-gubernio de la Janbian-a Kore-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Gilin. Ŝi naskiĝis en malriĉkamparana familio kaj ŝatas kanti de sia infanaĝo. Kiam ŝi lernis en elementa lernejo, ŝi ofte vizitis maljunan popol-

kantiston de la vilaĝo por lerni de li popolajn kantojn. En liberaj tagoj ŝi ofte ascendis monteton apud la vilaĝo kaj tie kantis plengorge. Ŝia kanto ŝvebis en betularoj sur la monto. Kiel malgranda betulo, ŝi rapide kreskis sur la tero de la hejmloko.

En somero de 1962, diplomite el la Janbian-a Pedagogia Lernejo, ŝi revenis al sia hejmloko Hehin-gubernio. Ĉar ŝi ŝatas kanti kaj deziris sin dediĉi al arto, ŝi estis postenigita kiel kantistino en la ensemblo. Kiel ŝi emociiĝis en tiu tempo! Nokte, sidante sub lampo ŝi malfermis verkon de Prezidanto Maŭ kaj serioze ekstudis. Kvazaŭ lumturo, la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* lumigis al ŝi la vojon por antaŭenmarŝo. Ŝi decidis diligente servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj per sia kantado, laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ.



Huang Jinsun ludas korean popolan kordmuzikilon.

Post nelonge, kreiĝis la kanto *Janbian-aj Popolanoj Amas Prezidanton Maŭ* kaj Huang Jinsun estis asignita por prezenti tiun kanton. Kiam ŝi legis la titolon de la kanto, ŝi tre emociiĝis ekmemorante pri la okazintaĵoj:

Antaŭ pli ol kvar monatoj ŝi venis al Pekino, la ĉefurbo de la granda patrujo, kiel membro de la Delegacio de Tutlandaj Nacimalplimultaj Junuloj por Vizitado. Iu tibeta membro de la delegacio, kiu antaŭe estis sklavo, faris komparon de la nova socio kun la malnova per siaj travivaĵoj. Li diris: "Antaŭe la reakciaj sklavmastroj senhaŭtigis vivan sklavon por fari homhaŭtan tamburon por sin amuzi; hodiaŭ liberigitaj sklavoj gastas ĉe Prezidanto Maŭ kaj vizitis multajn lokojn de la lando..." Liaj vortoj multe pli profundigis la konon de Huang

Jinsun. La sufero de la tibetaj fratoj estas ja komuna al ĉiuj nacimalplimultoj de la tuta lando. Antaŭ la Liberiĝo ankaŭ la patrino de Huang Jinsun estis popola kantistino. Tiam ŝi travivis diversajn malfacilojn kaj pezan subpremadon, neniam kantis kun ĝojo sed nur kun ĉagreno kaj malamo. Post la Liberiĝo la maljunulino ekhavis feliĉan vivon, kaj ankaŭ ŝia kantado satoriĝis de ĝojo. Nun ankaŭ Huang Jinsun fariĝis kantistino. Ĉio ĉi tio tre emociis ŝin. Precipe neforgesebla por ŝi estas tio, ke ŝi feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ en Pekino! Tiun nokton ŝi ne povis endormiĝi pro forta emocio. Ŝi pensis: Se ne estus Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, ne estus nia hodiaŭo! Estonte mi nepre pli bone kantas la novan vivon, Prezidanton Maŭ kaj la Komunistan Partion de Ĉinio!



Huang Jinsun kantas por laboristoj.

Por plene esprimi sinceran kaj varman amon de Janbian-anoj al Prezidanto Maŭ, Huang Jinsun iris al kamparo, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke literaturaj kaj artaj laborantoj devas iri inter la amasojn. Dank' al vivado kaj laborado kune kun la komunumanoj, ŝi starigis kun ili profundan amikecon kaj estis bone hardita. Ŝi ofte kantis al komunumanoj dum laborpaŭzo por stimuli ilian laboran entuziasmon kaj pro tio ŝi estis laŭdata de la amasoj.

Foje, reveninte de laboro ŝi ricevis sciigon, ke ŝi iru al la Centra Popola Radio por sonregistrado. Kiam ŝi forlasis la hejmlokon, komunumanoj ŝin akompanis ĝis la vilaĝfino. Tenante ŝian manon malriĉkamparano Onklo Gin elkore diris: "Vi estas nia kantistino. Ni esperas, ke via kantado esprimos la profundan amon de la Janbian-anoj al Prezidanto Maŭ."

Huang Jinsun ne vanigis la esperon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ĉiufoje, kiam ŝi kantas *Janbian-aj Popolanoj Amas Prezidanton Maŭ*, ŝi sentas kvazaŭ ŝi venus antaŭ Prezidanton Maŭ kun multaj vortoj por diri al li. Tial ŝi ĉiam kantas tiel varme, viveplene, sincere kaj kortuŝe.

Huang Jinsun ofte iris inter laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn por prezentado. Foje, ŝi kaj ŝiaj gekamaradoj venis al iu konstruejo, en neĝkovrita arbaro sur alta monto. Informiĝinte pri tio, laboristoj frue faris ĉian preparon por ilia prezentado. Ili vakigis kaj ordigis placon en la arbaro kiel scenejon kaj bruligis apud ĝi ligno-karbon. Post la prezentado laboristoj tuj metis sur ilin sian vatitan surturon. La zorgo de la laboristoj profunde kortuŝis Huang Jinsun kaj ŝiajn gekamaradojn. Post finiĝo de la prezentado ili, malgraŭ laciĝo, iris al loĝejoj de la laboristoj kaj lavis vestojn por la lastaj.

En la lastaj jaroj, sub la direktado de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, Huang Jinsun kantis por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj starigis profundan amikecon kun ili. Kien ajn ŝi iris, oni varme akceptis ŝin kiel sian parencon. Kiam ŝi forlasis iun lokon, tieaj popolanoj ŝin akompanis ĝis tre malproksime.

Nun per radio ŝia kanto disaŭdiĝis tra la tuta lando kaj vekis resonon ĉe la popolanoj.

*Ho, Prezidanto Maŭ,
Senlime ni vin amas!
Instruon vian firme ni tenados en la koro,
Kaj longan, longan vivon
Al vi deziras Janbian-a la popolo.*

ĈEN ŜENG:


Fajenca kaj

Arto de

EN la sudokcidenta antaŭurbo de Foŝan de Guangdong-provinco de nia lando estas Ŝivan, kiu famiĝis pro sia fajenca kaj porcelana industrio. La tuta Ŝivan havas 14 fajencajn kaj porcelanajn fabrikojn kun pli ol 8,000 laboristoj kiuj produktas ĉiutagajn bezonaĵojn, artaĵojn kaj industriajn bezonaĵojn.

En la produkta historio de pli ol 800 jaroj porcelanaj kaj fajencaj artaĵoj de Ŝivan formis sian propran stilon de "hiperbolo, simpleco kaj

Florvazo glazurita de nova kolora kristala glazuro



Porcelana

Ŝivan

forteco". Kaj Ŝivan ricevis la kromnomon "Fajenca Centro de Suda Ĉinio". Ĉiufoje, en la Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio okazigita ĉiun printempon kaj aŭtunon en Kantono, estas ekspoziciataj centoj da specoj de fajencaj kaj porcelanaj homoj, birdoj, bestoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj produktitaj de Ŝivan, kiuj ricevis laŭdon kaj bonan akcepton de la gastoj el diversaj landoj.

Kiam oni paŝis en la ekspoziciejon de Ŝivan-a Fabriko de Artaj Fajencoj kaj Porcelanaĵoj, lia atento tuj estis tirata de la montritaj diversaj objektoj. Ĉi tie estas artaĵoj kun novaj temoj kaj intensa spiro de la aktuala vivo pri lernado de Daking en industrio kaj lernado de Daĝaj en agrikulturo de nia lando; estas skulptaĵoj "Palestina Popolo en Batalo", "Ĉina Kuraca Taĉmento en Afriko", "Arĝenta Pilko Komunikas Amikecon" k.a. spegulantaj la batalon, unuiĝon kaj amikecon de la revoluciaj popoloj de la mondo; estas tradiciaj artaĵoj kiel "Trikoloraj Ĉevaloj de Tang-dinastio", "Maljuna Fiŝisto", "Du Gruoj sur Pinarbo", "Piga Monto" k.a.; estas ankaŭ bele desegnitaj objektoj por ĉiutaga uzo. Iuj artaĵoj altas plurajn futojn kaj aliaj estas tre malgrandaj kaj delikataj.

Fajencaĵoj de Ŝivan estas plejparte faritaj el tiea ruĝa feroza argilo. Post bakado la surfaco de la skulptaĵoj ne brilas, kaj havas koloron de sunbrunigita haŭto. La mienoj de la homfiguroj estas tre subtilaj, kaj ilia mensa aktivado estas vivece spegulita. Granda skulptaĵo "Lerni de Daking, Krei Miraklon" prezentas, ke maljuna laboristo kun peniko en la mano rigardas al skribita informo pri sukceso, lin ĉirkaŭas ĝojegaj homamasoj de junaj laboristoj, kadroj kaj teknikistoj kaj la fono estas granda nova ekipaĵo por produkto de sukero. Tiu ĉi verko spegulas la fruktojn de la teknika renovigo de laboristoj de la



Taj-nacieca knabino prove faras akupunkturadon

Sukerkana Kemia Fabriko de Giangmen de Guangdong-provinco post lernado de la spirito de laboristoj de Daking-petrolkampo peneme luktadi kontraŭ malfaciloj. La skulptaĵo estas tre ŝatata de laboristaj amasoj.

La ekspozitaĵoj estas miniaturo de la artaj fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj de Ŝivan, kiu spegulis la tute novan fizionomion de la formo kaj enhavo de tiu ĉi antikva artospeco.

Por speguli la riĉan aktualan vivon, en la heredado de tradiciaj teknikoj la fajencaj kaj porcelanaj laboristoj de Ŝivan faris disvolvon kaj kreon. En kreado de la skulptaĵa grupo de "Blankhara Knabino", kiu estis ekspoziciata en iuj landoj kaj akiris laŭdojn, ili aplikis ne nur tradiciajn modlajn metodojn, sed ankaŭ kreis eburkoloran materialon, el kiu ili faris fajencajn figurojn modestajn, elegantajn kaj helajn, tiel ke la skulptaĵa grupo pli konformas al la baletaj karakteroj de vigecko, flek-

siĝemo kaj forteco. Per nova metodo oni grandigis la stabilecon kaj solvis la problemon de aliformiĝo de figuro staranta sur unu piedpinto.

Ŝivan havis tradiciajn kolorajn Gjun-glazurojn, kiuj estas brilaj kaj variaj. Tamen ili iam malaperis antaŭ la Liberiĝo. En la lastaj jaroj, post ripetadaj provoj, laboristoj jam retrovis la tradiciajn glazurojn. Kaj krome plimultiĝis iliaj koloroj de du ĝis pli ol dek kaj dank' al apliko de ili pli belaj florzvoj, muraj ornamaĵoj, te-trinkilaroj ktp. estas produktitaj.

En 1958, sur la bazo de la tradiciaj koloraj glazuroj, fajencaj kaj porcelanaj laboristoj de Ŝivan sukcesis produkti kristaliĝan glazuron kun buntaj koloroj. En la lastaj jaroj, ili senĉese pli-

bonigis kaj plialtigis la teknikon. Dum bakado, sur la bakataj objektoj nature aperas kristalaj desegnoj similaj al umefloroj. La floroj estas grandaj diafanaj kaj brilaj kaj dislokiĝas elegante kaj varie. Vazoj de kristaliĝa glazuro ne nur taŭgas por diversaj praktikaj uzoj, sed ankaŭ havas altan valoron de arto. Precipe belaj kaj delikataj estas florzvoj de tia glazuro.

Post la Liberiĝo, la produkto de artaj fajencoj kaj porcelanaĵoj de Ŝivan rapide disvolviĝis kaj la nombro de fajencaj kaj porcelanaj laboristoj senĉese grandiĝas. Antaŭe Ŝivan havis nur kelkajn malgrandajn metiejojn kun malnovtipaj bakfornoj kaj la laboristoj estis portempaj dungitoj. Ili laboregis tutjare, tamen ne povis sin vivteni.




*La Ĉina Kuraca Taĉmento
en Afriko*

Pro malriĉeco iuj ŝanĝis sian profesion kaj aliaj migris aliloken. Metiartisto Oŭ Kian tre kapablis en skulptado de bestoj. Liaj verkoj estis tre vivecaj kaj tre ŝatataj. Sed pro malriĉeco li devigite forlasis la metiarton kaj komencis kulturi teron. Nelonge post la Liberiĝo, la popola registaro revenigis la formigrintajn metiartistojn al Ŝivan, organizis fajencajn kaj porcelanajn metiartistojn de la tuta Ŝivan por starigi produktan kooperativon, poste grandigis ĝin en la Ŝivan-an Fabrikon de Artaj Fajencoj kaj Porcelanaĵoj. En prilaborado de materialo, formigado kaj bakado, oni fundamente efektivigis mekanikigon aŭ duonmekanikigon. Post kiam la maljuna metiartisto Oŭ Kian revenis al Ŝivan en 1950, lia skulpta arto estis disvolvita. En 1955 li estis elektita kiel tutlanda avangarda laboranto.

Unuflanke la maljunaj metiartistoj okupas sin per nova kreado, kaj aliflanke ili transdonas sian sperton al junaj metiartistoj, por helpi ilin rapide mastri la teknikojn. Ĉe la Liberiĝo juna metiartisto Ĝuang Gia estis metilernanto, sed nun li jam kreis nombron da verkoj kun propra stilo, ekzemple liaj kreaĵoj “Maljuna Lignaĵisto”, “Landlima Patrolo” k.a, estas tre ŝatataj de la amasoj. La supre menciita “Lerni de Daking, Krei Miraklon” estas kreita ĝuste de Ĝuang Gia kaj liaj kolegoj post vivado kaj laborado kun laboristoj kaj interkonsiliĝo pri kompono de la verko.



Maljuna fiŝisto



Tradicia kolora Gjun-glazura te-trinkilaro

Teo

LA te-produktado de nia lando havas longan historion. Laŭ noto en antikva libro en Ĝoŭ-dinastio (de la 11-a jc. ĝis la 3-a jc. a. K.) jam funkciis specialaj ŝtataj oficistoj por administri te-produktadon. Tio montris, ke tiam nia popolo jam kulturis te-arbedojn. Depost la 3-a jc. p. K., te-trinkado jam populariĝis. Ĉirkaŭ 780 p. K.

literaturisto Lu Ju publikigis la unuan libron *Pri Teo*, kiu resumis sperton de nia laboranta popolo en kulturado kaj preparado de teo kaj pritraktis trinkadon kaj aprezaĵon de diversaj teoj.

Te-trinkado jam fariĝis kutimo de nia popolo. La verda teo estis plej frue uzata. Nur en la 14-a jc. p. K. oni ekhavis nigran teon. Nun teo ne nur

Membroj de la komunumo "Okcidenta Lago" de Hangĝoŭ plukas tefolion.



estas nemankigebla en la ĉiutaga vivo de nia popolo, sed ankaŭ ordinara trinkaĵo dum akceptado de gastoj.

Te-trinkado povas stimuli digestadon kaj asimiladon de nutraĵo, kvietigi soifon, mildigi varmon kaj laciĝon, vigligi spiriton kaj mortigi bakteriojn, ĉar teo entenas plurajn vitaminojn, taninon kaj kafeinon.

La ĉina teo estas multspeca. Krom la du ĉefaj kategorioj de la nigra kaj verda teoj, ankoraŭ estas Ulong-teo, aromigita florteo, teo en diversformaj brikoj kaj aliaj. Kaj ĉiu speco konsistas el multaj varioj. Ekzemple, estas ĉ. 30 varioj de nigra kaj verda teoj ŝatataj en kaj ekster Ĉinio.

La diversaj teoj havas malsamajn karakterojn kaj gustojn. Eŭropa botanikisto Linnaeus opiniis ke la nigra kaj verda teoj devenas de malsamaj tearbedoj. Efektive, ilia malsameco ĉefe devenas de tio, ke la tefolioj estas plukitaj kaj preparitaj per malsamaj metodoj.

La normo kaj tempo por pluki tefoliojn decidas la kvaliton de teo. Por akiri bonkvalitan teon oni devas pluki burĝonojn nur kun malmultaj folietoj, se la nombro de folietoj superas certan normon, do la tea kvalito estas kompare malbona.

La nigra teo kaj verda teo estas preparitaj per malsamaj metodoj. La ĉefa procedo por pretigi la nigran teon estas fermentado, por ke la tanino de teo oksidiĝu certgrade kaj ĝia verda koloro fariĝu flava kaj poste bruna. Dank' al tia procedado la teo estas senigita je la origina amaro kaj fariĝis pli aroma kaj dolĉa. La infuzita teo estas freŝe ruĝa kaj klara, kaj taŭga por aldono de sukero kaj lakto. La nigra teo produktata de Kimen de Anhuj-provinco kaj de Siĉuan, Junnan kaj aliaj provincoj estas fame konata. Post la Liberiĝo la alia bonkvalita nigra teo de Jingde estas vaste ŝatata de konsumantoj.

La ĉefa procedo por prepari verdan teon estas detruo la aktivecon de fermento en freŝaj tefolioj per alta temperaturo por preventi oksidiĝon de tea tanino. La teo preparita per tia metodo konservas sian naturan koloron, ĝia infuzita trinkaĵo estas klara, verda, freŝe aroma kaj gustoforta. Estas ankaŭ multaj varioj de verda teo, interalie estas la fame konataj Longging-teo de la Okcidenta Lago, Biluoĉun-teo de Tajhu-lago kaj Dongting-lago, Maŭfeng-teo de Huangŝan, Guapian-teo de Liu-an kaj aliaj.

Ĉinio estas la origina lando de tearbedoj. En la libro *Pri Teo* oni jam preparolis la originan lokon de teo Nanĝong (en la nuna provinco Junnan). Dum la pasintaj pli ol du mil jaroj, nia laboranta popolo pli kaj pli vastigis la te-kulturajn areojn de Hajnan-insulo en la sudo ĝis Juntaj-monto de Giang-su-provinco en la nordo, de Ĉangning-gubernio de Junnan-provinco en la okcidento ĝis Tajvan en la oriento.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la te-kulturistoj, sub forta subteno de la Partio kaj registaro, aktive restarigis la malnovajn te-ĝardenojn kaj fondis novajn, plivastigis te-plantajn areojn kaj grandigis la pomuan produktan kvanton, tiel ke la produkto havas grandan disvolviĝon. Oni ankoraŭ faris sciencan eksperimentadon kaj sukcesis en te-kulturado en iuj novaj lokoj, kie oni antaŭe neniam kulturis tearbedojn. Ekzemple, en la apudmara provinco Ŝandong antaŭe tearbedoj neniam estis kulturataj; en la lastaj jaroj, oni sukcesis planti tearbedojn en ĝiaj 28 gubernioj kiaj Jantaj kaj Tajvan kaj komencis rikolti tefoliojn. Krome, oni ankoraŭ sukcesis planti tearbedojn en iuj lokoj de suda Ŝenhi kaj Tibeto. Tio kreis novan kondiĉon por disvolvo de tea produktado.

Jam en la 5-a jc. p. K., nia lando komencis eksporti teon al diversaj landoj de Azio kaj en la 13-a jc. al Eŭropo. En diversaj landoj ĝi ricevis bonan akceptadon de konsumantoj. Post la Liberiĝo, nia lando helpis Malion, Gvineon kaj Marokon enkonduki niajn tesemojn en tiujn landojn kaj instruis al iliaj popolanoj nian sperton en kulturado kaj preparado de teo por ke ili disvolvu sian tean aferon. Tiuj helpoj ne nur akcelis la reciprokajn rilatojn de nia lando kun multaj landoj, sed ankaŭ disvolvis la amikecon inter la ĉina kaj la koncernaj popoloj.





Valora Drogo

LUN matenon, apenaŭ la Brutajkolekta Stacio de Vejziju-komunumo de Liaŭning-provinco malfermis la pordon, maljuna komunumano Vang Venĝen jam enpaŝis. Li prenis el sia sino paperan paketon, ĝin malvolvis kaj vidigis objekton kun grandeco de sojfaba grajno. Transpreninte ĝin, iu laboranto de la stacio diris post pririgardo: “Oĉjo, ĝi estas bova bezoaro. Ĉu vi volas ĝin vendi al la ŝtato?” Vang Venĝen diris post pripenso: “Jes, bone.” La laboranto ĝin pesis kaj diris al li, ke ĝi estas unuaklasa drogo, pezas je 0.4 gramo kaj kostas 16 juanojn.

“Kamarado, donu al mi kvitancon, ĉu bone?” Vang demandis.

“Ĉu ĝi ne estas via? Por kio vi bezonas tion?”

“Mi ne povas konsideri ĝin kiel mian!” Vang ekridetis kaj rakontis, kio okazis al li.

Antaŭ tri tagoj, subite inflamiĝis la okuloj de lia edzino kaj ne

povis klare vidi. Kuracisto de la produkta brigado diris, ke trinkado de likvo de bovvalo povas kuraci tian malsanon. Ĝuste tiam la produkta grupo buĉis maljunan bovon, kiu jam ne povis plugi, kaj Vang aĉetis la galon por kuraci sian edzinon,

Post trinko de bovvala likvo, la okuloj de lia edzino iom resaniĝis kaj ŝi intencis trinki refoje. Kiam ŝi prenis la bovvalon, ŝi sentis ion malmolan en ĝi. Ŝi demandis al la edzo: “Vidu, kio estas en ĝi?”

Vang malfermis la galon kaj trovis flavan buleton. Li pensis, ke ĝi eble estas bezoaro. Li ne respondis al ŝi kaj ekbolis pensoj en lia kapo.

Bovvala bezoaro estas valoriga drogo, kiu estas altefika por kuraci febron kaj inflamon. Vang pensis, ke ĝi certe pli bone efikas, se ĝi estos uzata por kuraci la okulojn de la edzino. La bovvalo estis aĉetita de li, do la bezoaro devas aparteni al li, ĉu ne?

Tamen li ekmemoris Ĝang Side kaj N. Bethune, kiuj estas bonaj ekzemploj de senegoismeco. Li tuj decidis ĝin transdoni al la produkta grupo, ĉar li aĉetis nur la galon, sed ne la valoran drogon en ĝi, do la bezoaro apartenis al la kolektivo.

Li tuj diris al sia edzino: “Ŝajne ĝi estas bezoaro. Mi petos, ke laboranto de la brutajkolekta stacio ĝin ekzameni. Se ĝi estas bezoaro, mi ĝin transdonos al la grupo.”

Li diris al la laborantoj de la stacio, ke li transdonos la ricevitan monon al la produkta grupo.

Aŭdinte la rakonton de Vang, ĉiuj laborantoj de la stacio esprimis sian volon lerni de li. Vang revenis al la produkta grupo kaj donis al ĝi la ricevitan sumon. Informiĝinte pri lia laŭdinta ago, ĉiuj komunumanoj diris, ke li estas bona komunumano tutkore servanta por la bono de la kolektivo.

Korespondi Deziras

*Boiangiu Nicolae, str. 24 Januarie, Calimanesti, Jud. R. Vileea, Rumanio, kun ĉl. pri numismatiko kaj interŝ. bk, pm. Respondo certa.

*Osowski Franciszek, Biolsko-Biala ul. Wandy Wasilewskuj 41/6,

Pollando, kun ĉl. per bk aŭ letere, interesigas pri turismo kaj foto-arto.

*Jaroslav Bacovsky, Dvorakova 51, Prerov, ĈSSR, kun ĉl.

*Johano Brenner, Piata Libertatii n-ro 9, Sighetu-Marmatiei, Depart. Maramures, Rumanio, 27-j. ĉefoficisto, kun amikoj tutmondaj.

*Jan Chladny, Batovce 246, okr. Levice, Ĉeĥoslovakio, 18-j. fraŭlo, kun ĉl kaj interŝ. bk.

*Karl Siegmund, 42 oberhausen, Osterfeld, Waisenhausstrasse 41, Germana Federacia Respubliko, kun geesp-istoj el la tuta mondo.

PLI OL 90,000 MALAMIKOJ ESTIS EKSTERMITAJ EN LA SUDA VJETNAMIO

De la 30-a de marto ĝis la unua de majo la heroaj sudvjetnamaj armeanoj kaj popolanoj akiris brilajn venkojn dank' al bravaj bataloj, en kiuj ili ekstermis pli ol 90,000 malamikojn kaj liberigis multajn gravajn areojn.

Vespere de la 6-a de majo Nguyen Phu Soai, la aganta estro de la Speciala Delegitaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio al la Vjetnama Demokratia Respubliko, okazigis akceptan kunvenon de ĵurnalistoj en Hanojo kaj publikigis militan komunikon de la komandejo de la Sudvjetnamaj Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj.

La komuniko diras, ke la sudvjetnamaj armeanoj kaj popolanoj faris plenan kaj grandskalan atakon al malamikoj sur ĉiuj batalejoj. En kontinua kaj brava batalado de unu monato ili ekstermis pli

ol 90,000 malamikojn kaj faligis kaj detruis 530 malamikajn aviadilojn.

9 USONAJ AVIADILOJ FALIGITAJ EN LA NORDA VJETNAMIO

En la 6-a de majo la usonaj piratoj ekspedis aviadilojn por ataki loĝkvartalojn de provincoj Nam Ha kaj Thanh Hoa. La armeanoj kaj popolanoj de la nomitaj provincoj brave batalis kaj faligis 3 usonajn aviadilojn.

En la 4-a kaj 5-a de majo 3 usonaj aviadiloj estis faligitaj de la armeanoj kaj popolanoj de provincoj Nghe An, Ha Tinh kaj Quang Binh.

Antaŭtagmeze de la 3-a de majo la armeanoj kaj popolanoj de Quang Binh kaj Vinh Linh faligis 3 usonajn aviadilojn.

GRAVA KAMBOĜA URBETO KOMPONG TRACH ESTIS LIBERIGITA

En la 30-a de aprilo la Kamboĝa Naciliberiga Armeo liberigis Kompong Trach, la gravan militan bazon de la pupa trupo de Pnompno en la suda defenda linio, ekstermis pli ol 2,000 malamikojn kaj faligis ĝiajn 9 aviadilojn.



Gerilanoj de Gio Linh-distrikto de suda Vjetnamio okupis komandojn de la 57-a regimento de la saĝona pupa armeo.

Sur la Kovrilo:

La kanoto sur la Suda Lago de Giahing-gubernio de Ĝegiang-provinco, en kiu okazis la Unua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

Sur la Dorskovrilo:

Plugado sur kampo abunda je sterko-herbo en printempo

KOREKTO

Sur la paĝo 18, n-ro 6, anstataŭ “cekumo” legu “rektumo”.



EL POPOLA ĈINIO 人民中国报道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO--LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 7 (168) 1972

Ĉefa Enhavo

Laborista Inĝeniero Li Ĉuangiang	1
Vej Giangge — Montohakanto kaj Vojmalfermanto	6
Hu Gujhiu	10
Veteranaj Modeloj de la Industria Fronto	13
Mastroj de Minejo	16
Printempo de Antikva Urbo	21
La Ŝanĝiĝo de Aba	23
Maduo-stepo	25
La Glora Korea Popola Revolucia Armeo	27
Rememoro pri la Koreaj Kunbatalantoj	29
En Amikeca Magazeno de Ŝanhajo	31
Kore-nacia Kantistino Huang Jinsun	34
Fajenca kaj Porcelana Arto de Ŝivan	36
Teo	40
Valora Drogo	42



Speco de prunuso (*Prunus triloba*)

Foto de Lejlej

